

BULGARA ESPERANTISTO



9-1980

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Hodiaŭ ni povas kun profunda kontentigo kaj flero deklari: la socialismo, por kies elmilito la bulgara popolo verŝis tiom da sango kaj donis sennombrajn karajn viktimojn, por kies konstruado ĝi aplikis ĉiujn siajn fortojn, la tutan sian talenton kaj sindonecon — venkis definitive kaj renuliĝeble en la sociopolitika vivo, en la ekonomiko kaj la kulturo de Bulgario, en la vivmaniero kaj animeco de nia popolo.

TODOR JIVKOV





Floranta nova Bulgario la be'ega rip zkomplekso "Albena" sur la bordo de Nigra Maro



Elementa kurso gvidata de E-instruisto Ljuben Grozdanov (vd. paĝen 12)

ENHAVO

- * * Rekono de Bulgario. Intervjuo kun s-ro Romeŝ Candra 1
- * * Eldiroj de delegitoj de la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco 2
- * * P ŝo en ĝusta direkto. Intervjuo kun s-ro Ro Hius 3
- * * La septembra entuzismo. Intervjuo kun Dmitriĝ Gr. Rimarev 4
- B. Gloginski. La sentima kaj la netaksebla Petro Konstantinov. Manifestaĵoj de la popola animo 7
- * * En la v'coj de la akti'aj kontraŭfasismaj batalantoj. Intervjuo kun Kiril Manov Savov 8
- Krum Kjuljajkov. Dimitro Kalaŝki 9
- Sergej Ostrovoj. La milito 9
- Petro Poliŝĉuk. Frata saluto 10
- Penka Papazova. Mi estas parteto de vi 10
- Dimitro Petrov. Miŝa — la verkinto 10
- Hristo Maroĵov. Eldiro en la 40a kongreso de BEA 11
- Nik. Turistoj propagandas E-on. 12
- D. Koseva Hungaraj e-istoj en Targoviŝte 12
- * * La internacia komunikado kaj la junularo. Intervjuo kun E. O. Fernandez 12
- * * La unua esperantisto-kosmonaŭto 14
- V. Bårdarov. Bonege plezantis sin en Hungario 14
- * * Sukcesoj de E-on en Krasnodar (USSR) 14
- Vladimir Sapoĵnikov. Plensukcesa CrSEJT-22 14
- K. K. Kontraŭ la diskriminacio. (La 65a UK en S'io holmo) 15
- T. Maslenko. Junpioniroj aktivas en Kiŝinev 15
- Naum Sigal — Podolskij. Instruisto de instruisto. Krilov en Esperanto. 16
- Dimitro Mutuŝev. Kooperativa broŝuro en Esperanto 16
- L. Mihajlov. Pri la kunmetitaj vortoj III
- * * Mozaiko IV
- Marija Blagoeva. Vortenigmo IV
- * * Solvo de tasko „Ĉu vi estas observema?“ IV

Sur la kovrilpaĝo:

Nova Bulgario — supreniranta, forta kaj feliĉa

Redakta komitato:

Kunco VĀLEV (ĉefredaktoro), Vasil BOROVSANSKI, Evgeni GEORGIEV, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Haim LEVI (viceĉefredaktoro), Flori NIKOLOV.

Administranto: Metodi Garev

Korektis: Rajna Konstantinova
Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919
Eldonkvanto 6100.

NIAJ PERANTOJ

Alfabeto laŭ landoj:

Britio. Covenham Louth, Lincs,
Laycroft Main Road, s-ro Paul Hewitt

Ĉeĥoslovakio. 040 01 Košice,
Šmerova 35/1, Esperantisto Slovaka,

Daniel Papak
Finnlando. PL 221, SF 70 101, Kuopio 10,

Finnä Esperanto-librejo

Francio. 54042, Nancy Cedex
11 Cours Lecpold, s-ro Roger Degrelle

Germana Demokratia Respubliko,

DDR 108 Berlin, Charlotten str. 60,
Centra Laborrondo Esperanto

Hispanio. Gijón Asturias, Ramon y Cial,
44-3° — Izqda, s-ro Adonis Gonzales Meana

Italio. 20052 Monza (Milano), c/o Romano Morelli,
via G. Cantore 8, Grupo Esperantista Monzese

Kubo. Habana 1, poŝtkesto 314,
Kuba Esperanto-Asocio

Mongolio. Ulan-Bator, poŝtkesto 733,
Mongola Esperanto-Asocio

Vjetnamio. Hanoi, 222 Dô Cẩn,
Vjetnama Pacifika Esperantista Asocio



REKONO DE BULGARIO

De la 23 ĝis la 27 de septembro en Sofio okazis la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco. Lige kun tiu eksterordinare grava evento s-ro ROMES CÂNDRA, la apostolo de la paco el Hindujo, prezidanto de la Monda Packonsilio, estis afabla dividi siajn pensojn pri la monda pacmovado kaj la Parlamento de la Popoloj.



— Ĉu la eventoj, okazintaj en la mondo dum la lastaj jaroj, influis la karakteron de la monda pacmovado?

— Vere la pacmovado hodiaŭ konsiderinde diferencas de tio, kio ĝi estis antaŭ kvar jaroj. Nun ĝi estas multe pli vasta kaj populara. En ĝi partoprenas kaj gvidantoj de komunistaj kaj socialistaj partioj, kaj reprezentantoj de socialdemokrataj, kristandemokrataj, liberalaj, radikalaj kaj centristaj partioj, naci-liberigaj movadoj, sindikataj kaj amasaj organizoj, religiaj agantoj ka. Konsiderinde kreskis la nombro de kulturaj, sportaj, junularaj, virinaj kaj sociopolitikaj organizaĵoj en la naskiĝintaj dum tiu periodo ŝtatoj. Samtempe pligrandiĝis ankaŭ la aktiveco de la partoprenantoj en la pacmovado. Firmiĝis la ligoj kun la internaciaj registaraj orga-

noj kaj institucioj kiel UN, UNESKO, la parlamentoj de la influhavaj landoj ka. Ĉio ĉi sendube kreas favorajn kondiĉojn por popularigo kaj fortikigo de la humanaj ideoj de la pacamaj fortoj.

— Kial, laŭ vi, Sofio estis elektita kiel dommaŭstro de la Monda Pacparlamento?

— Nature, por la organizado de tiu renkontiĝo estas necesaj sperto kaj internacia rekono. Sofio neŝve pruvis siajn eblecojn pri okazigo de diversaj pacamaj iniciatoj: la Internacia Infanasembleo „Standardo de la Paco“, la 64a Interparlamentara Konferenco, la seminario de la Kristana Pacokrea Konferenco, la internaciaj renkontiĝoj de la verkistoj ka. La iniciato pri okazigo de Monda Pacparlamento de la popoloj en Bulgario apartenas al s-ro Todor Jivkov, kiu en 1977 jaro adresis inviton al la Monda Packonsilio. Do post la Monda Kongreso de la Pacamaj Fortoj en Moskvo (1973 j.) kaj la Monda Asembleo de la Packonstruantoj en Varsovio (1977j.) la sekva monda pacforumo okazis en Sofio. Ĝia efektiveco evidente estas rekono de Bulgario pro ĝia kontribuo al la realigo de la Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Helsinko, pro ĝia konsekvenca pacama politiko en la antaŭvespero de la 1300a datreveno ekde la fondaĵo de la bulgara ŝtato.

— Kial estas via opinio pri la rolo de la rimedoj de amasinformado kaj pli konkrete — de la ĵurnalistoj — por la pacafero?

— Estas klare, ke la konservo de la paco altgrade dependas ankaŭ de la televido, radio, ĵurnaloj kaj gazetoj, kiuj spegulas la internaciajn eventojn en la diversaj regionoj de la terglobo. La Monda Packonsilio subtenas aktivajn kontaktojn ankaŭ kun la Internacia Organizo de la Ĵurnalistoj. Feliĉe, la pliparto de la „plumfratoj“ servas fidele al la homaro kaj spegulas objekte kaj kompetente la deziron de la popoloj vivi en daŭra paco. Bedaŭrinde, estas ankaŭ ĵurnalistoj, kiuj


ne servas al tiu ideo. Se ni dum la lastaj semajnoj malfermus iujn okcidentajn gazetojn, ni konstato, ke multaj okcidentaj ĵurnalistoj jam „kalkulas“ la viktimojn de la nova nuklea strategio de prezidento Ĵimi Karter, t. e. ĉu restos 10%, 20% aŭ 30% el la civilizacio en okazo de mondmilito. Sed tiuj sugestoj neniel kontribuas al la venko de la paco. La signifo kaj senco de nia movado estas — per la socio, per la publika opinio konvinki la registarojn de ĉiuj landoj, ke la milito ne plu devas esti rimedo por solvado de la disputindaj problemoj. La milito devas esti por ĉiam malpermesita kaj ĝiaj „relikvoj“ devas resti nur en la muzeoj de la historio. Bedaŭrinde, ankaŭ en niaj tagoj ekzistas registaroj, kiuj propagandas la militon kaj la militminacon kiel oficialan ŝtatan politikon.

— Kia estas la rolo de la Mondparlamento, se ni havas antaŭvide, ke ĝi okazas post la Olimpikoj en Moskvo kaj antaŭ la grava konferenco en Madrido?

— Estas konate, ke la malamiko de la paco kaj la malarmigo sensukcese bojkotis la olimpikojn. Mi persone ankaŭ estis en Moskvo kaj konvinkigis pri tiu fakto. Evidente, nun la sekva paŝo al la paco pasas tra Sofio — la ĉefurbo de la Monda Pacparlamento. Tiu ĉi Parlamento estas la unua, sed nemirige, ke post ĝi okazos dua, tria... Sendube ĝi efikos pozitive por kreo de bona politika klimato por la antaŭstaranta konferenco en Madrido.

La apogo de la ekstera politiko de Vaŝingtono

(El ĵ. „New York Times“, Usono)



— Vi menciis, ke vi ĉeestis la Olimpikojn en Moskvo. Ĉu vi ŝatas la sporton? Ĉu vi sportas?

— La sporto ankaŭ estas unu el la formoj por firmigo de la paco en la mondo. Ne hazarde ankaŭ en la Fina Akto de Helsinki samtempe kun la kultura, ekonomia, spirita kaj turista interŝanĝo oni instigas al vastigo de la sportaj kontaktoj inter la popoloj kun diferenca sociordo.

Pri mi mem mi povus diri, ke mia amata „sporto“ estas la fortikigo de la paco. Nature, kiel juna ankaŭ mi sportis aktive. Mi ludis bone tenison, sed tiu ĉi sporto, kiun kelkaj ankaŭ nun nomas „diplomato“, bedaŭrinde ne fariĝis olimpika...

— Kia vi vidas la mondon en la 2000a jaro?

— Sen militoj, sen atomaj kaj neŭtronaj bomboj, sen nuklea strategio kaj armilaj konfliktoj. Se la civilizacio saviĝos, tio okazos ĉar la fortoj de la paco venkos! Sed por tio estas necese, ke ĉiuj homoj sur la terglobo estu konvinkitaj kaj batalu, por ke ne estu milito!

Eldiroj de delegitoj de la Pacparlamento

TUTHOMARA PROBLEMO

Unu el la plej noblaj devoj de ĉiu honesta homo kaj aparte de la kreanto en la sfero de la scienca penso estas ne permesi la uzadon de la naturo kaj tekniko kontraŭ la homaro, kontribui por la venko de tiu forto, kiu donas la ridetojn de la patrinoj, la bonstato de la homoj. La batalo por paco nun bolas en ĉiuj kontinentoj, en ĉiuj landoj. Dum la bruligantoj de nova milito konstruas subterajn, aerajn kaj marajn bazojn, la adeptoj de la prudento transformas en bazon la tutan terglobon. La planedo sin preparas renkonti plej solene la Mondan Pacparlamenton. Eviti la militon, fiaskigi la planojn de la imperalistoj — tio dependas de ni, la centoj da milionoj da homoj de la nobla, honesta laboro. Kun la tuta pasio de niaj koroj, kun konscio pri la historia respondeco antaŭ la generacioj ni apartigas tempon el niaj pacaj okupoj, por ke ĉiuj, ankaŭ la ankoraŭ ne konsciaj, komprenu, ke la paco oni ne devas atendi, ke la paco oni devas elmiliti, ke oni povas kaj devas bridi la krimajn frenezulojn. La popoloj povas kaj devas savi — kaj ili savos — la mondon de nova milito!

akademiano VLADIMIR GEORGIEV,

direktoro de la Unueca Centro de Lingvo
kaj Literaturo ĉe Bulgara Akademio
de Sciencoj

POTENCA PUŜO ANTAŬEN

Hodiaŭ ĉiam pli kaj pli vastaj socitavoloj konsciiĝas pri la historia postulo helpi la solvon de la ĉefa tasko — certigi daŭran pacon en la mondo. Al tio direktis sian agadon ankaŭ la vilaĝanaj kaj la aliaj demokratiaj fortoj kaj organizaĵoj, komprenintaj, ke la progreso kaj la solvo de ĉiuj, inkluzive la agrarajn problemojn, estas ebla nur en la kondiĉoj de paco kaj internacia kunlaborado.

La internacia demokratia agrarista movado estas large prezentita en la Mondparlamento, kaj tio donas novan esprimon de ĝia volo kontribui al la paco. La Monda Pacparlamento, tiu vaste reprezenta fo-



rumo, estas majesta manifestajo de la eblecoj kaj decidemo de la pacamaj fortoj, ĝi difinas ties strategion dum la 80aj jaroj kaj donos novan, potencon puŝon al pluaj agoj kontraŭ la militminaco. La alvoko pri prudenteco kaj paco, direktita de la tribuno en Sofio, reŝlos forte tra la planedo, ĝi mobilizos, ĝi daŭre kaj favore efikos la unuecon kaj estontajn iniciatojn subteno al la konstruaj proponoj pri firmigo de la malstreĉeco.

La monda Pacparlamento en Sofio estas nova, granda rekono pri la konsekvenca paca politiko de la mondo de la reala socialismo, de Popola Respubliko Bulgario, de la kontribuo kaj meritoj de la Bulgara Komunista Partio.

ANGEL DIMITROV

sekretario de la Plenumkomitato
de Bulgara Agrarista Popola Unuiĝo

HISTORIA RESPONDECO

La paco kiel kondiĉo por la bonfarto de la homo kaj florado de la kulturo de la socioj estis ĉiam apogopunkto de la kreantoj por doni novajn verkojn pri tiu temo, kiu spegulas la vivon mem.

La paco kiel fenomeno en la politika vivo de la ŝtato staris ĉiam en la centro de nia socialisma socio. Kaj ne hazarde la Pacparlamento kunsidas en Bulgario — fakto, kiu parolas pri la internacia rekono de nia lando. Tiu ĉi tribuno donas ankoraŭ unu esperon, ke niaj infanoj, kiujn ni edukas en spirito de humanismo, vivos pace kaj trankvile por konstrui la estonton de la homaro.

Fidon al la estonto! — tiun alvokon adresas Sofio al la tuta homaro.

prof. ALEKSANDRO RAJČEV

prezidanto de la Asocio de
Bulgara Komunistoj

PAŜO EN ĜUSTA DIREKTO

Inter la senditoj al la Monda Parlamento de la popoloj por Paco en Sofio estas ankaŭ s-ro **ROJ HJUS**, kun kiun ni havis la eblecon renkontiĝi kaj paroli pri la gravega evento. S-ro Hjus estas membro de „Labour“-partio (Labor-partio) kaj jam 15 jarojn estas reprezentanto de sia partio en la ĉambro de la komunumoj en Londono.

Ni petis s-ro Hjus rakonti pri la agado de la britaj adeptoj de la paco. Li diris:

— La realisme pensantaj politikaj agantoj, samkiel la vastaj popoltavoloj en nia lando estas maltrankviligitaj pro la planoj de la konservativa registaro, direktitaj al plua akcelo de la militarizado. Aparte fortaj estas la protestoj kontraŭ la nuklea armigado. Okazis demonstracioj kontraŭ la decido de la konservativuloj lokigi sur la teritorio de Anglujo usonajn raketojn kun meza radiuso de agado.

La agado de la pacamaj fortoj en la lando estis sub tenita kiel de deputitoj „Labour“-partianoj, tiel ankaŭ de la Sindikatoj. Unuafoje en la ĉambro de komunumoj estis formita packomitato, kiu kondamnas la nukle-ambiciojn de la konservativuloj, substrekante, ke ilia politiko plifortigas la minacon de nova termokuklea katastrofo kaj kondukas al malbonigo en la internaciaj rilatoj. Nun plej vastaj rondoj, partoprenantaj en la movado de la pacamaj fortoj, fiksas siajn kandidatojn por la Monda Parlamento en Sofio.

— Kiel oni akceptis la ideon pri kunvoko de tiu parlamento?

— Tiu ĉi forumo estas organizata en komplikaj cirkonstancoj. Jam plurajn jarojn en la mondo okazas akra ideologia batalo, estas farataj provoj revenigi la homaron al la tempo de la „malvarma milito“. Tial la ideo pri kunvoko de Parlamento de la Popoloj estas eksterordinare populara sur nia planedo. Laŭ mi tiun ĉi ideon oni aprobas ĉie. La forumo en Sofio estas paŝo en ĝusta direkto. Mi opinias, ke ĝi estos fruktodona.

— Ordinare la eksterlandanoj, vizitantoj Bulgarien, diras, ke ĝi estas bela kaj gastama lando. Kion vi diras tiurilate?

— Via lando vere estas bela kaj gastama. Tio ĉi estas realaĵo, kiujn eksterlandano ne povas ne vidi. Via registaro ludas aktivan rolon sur la internacia areno. Ĝi kreis bonegajn kondiĉojn por efektiva de vicoj da iniciatoj kun monda signifo. Laŭ mi unu el la suproj de tiu ĉi aktiveco estas la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco. Mi estas ravita, ke malgranda lando kiel la via ludas tiel gravan rolon en la serĉado kaj trovado de vojoj al certigo de daŭra paco en la mondo. Kaj ankoraŭ io, kion mi ne povas preteriri. Bulgarien mi vizitas triafoje dum la lastaj jaroj: la sukcesoj en ĝia evoluo estas eksterordinaraj.

La intervjuon faris

Vasil Asparuhov kaj Petro Blaskov

GRAVA!

PERE DE VIA E-SOCIETO AŬ LA POŝTO ABONU TUJ VIAN PLEJ NECESAN GAZETON «BULGARA ESPERANTISTO»! Ĝi estas bona informanto, organizanto, instruanto kaj edukanto por ĉiu esperantisto — nova kaj malnova, juna kaj maljuna.

Faru valoran donacon al via eksterlanda amiko, abonigu lin al „BE“ — li certe reciprokos per intereso por vi esperantaĵo.



En la tagoj post la popola venko je la 9, IX 1944: purkore, ame, entuziasme la bulgarioj el ĉiuj agoj kaj socitavoloj renkontis siajn fratojn-liberigintojn — la sovetajn soldatojn.

Frataj salutoj

AL BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

bul. Ĥristo Botev 97, Sofio

Karaj geamikoj, ni tutkore gratulas vin okaze de la 36a datreveno de la socialisma revolucio en Bulgario. En septembro 1944 en la sorto de la bulgara popolo okazis historia turniĝo. Dum la pasintaj 36 jaroj la krea laboro de la popolo sub la gvido de la Bulgara Komunista Partio transformis vian patrujon en floran socialisman landon. Kune kun la popoloj de ĉiuj

socialismaj landoj kaj la progresemaj fortoj de la homaro Popola Respubliko Bulgario batalas senlace por mondpaco.

En la tago de la glora datreveno la sovetaj esperantistoj deziras al siaj bulgaraj geamikoj novajn grandajn sukcesojn en la konstruado de evoluinta socialisma socio, en la batalo por paco kaj sekureco en Eŭropo kaj la tuta mondo.

ASOCIO DE SOVETAJ ESPERANTISTOJ

LA SEPTEMBRA ENTUZIASMO

Kiam **DMITRIJ GRIGORIEVIĈ RIMAREV** rakontis al mi la historion de sia unua veturado tra Bulgario en septembro 1944, mi demandis: „Ĉu neniam vi rakontis pri tio?“ Li respondis kun rideto: „Ne estis okazo kaj nia veturado estis simple aventuro, kiu igis min por tuta vivo ami Bulgarijon!“

La sovetaj militkorespondantoj Rimarev fotis dum la tuta Granda Patruja Milito. Li dufoje estis honorita per Stata Premio. Kun li mi parolis dum lia restado en Bulgario, 36 jarojn post la neforgeseblaj septembraj tagoj.

— En la komenco de septembro 1944 ni, grupo da sovetaj korespondantoj, estis en Gurĝu (Gjurgevo), Rumanio, — rakontas Rimarev. — Bedaŭrinde mi ne memoras la ĝustan daton — eble la sesan aŭ sepan de septembro. Tiutempe la baza grupigo de la Soveta Armeo estis en Rumanio. Ni sciis, ke ĉe Varna aŭ Burgas estas preparata desanto, sed ne estis klare — ĉu Bulgario militos kontraŭ Sovetunio aŭ ne. Generale ni opiniis, ke militagoj ne okazos, sed pli detalan informon ni ne havis. Kaj jen — en tiuj kondiĉoj de neinformiteco kaj atendado oni tute subite sciigis al ni, ke la estro de la garnizono en Ruse, bulgara generalo, kies nomon bedaŭrinde mi ne memoras, invitas en la urbon al amika vizito la sovetajn militkorespondantojn. Estis milito, kaj subite tiu ĉi invito: „Mi petas, bonvolu en Ruse! La bulgaraj oficiroj volas renkontiĝi kaj paroli kun vi.“

Tiam inter Gurĝu kaj Ruse cirkulis malgranda ŝipeto. Nia estraro permesis veturi kaj jen ni — grupo de

25–30 korespondantoj en oficiraj uniformoj, enŝipiĝis kaj alvenis en Ruse sen gardistaro. Renkontis nin oficiroj en uniformoj de la Bulgara Armeo. Ili kondukis nin al la oficira klubejo. Tie jam atendis ĉirkaŭ 40 personoj. Ĉiuj sidigis apud longa tablo — la generalo frunte, kiel dommaŝto, kaj ni mikse — unu sovetaj oficiroj, unu bulgara. Oni plenigis la glasojn per „slivova“. La bulgarioj levis tostojn kaj diris, ke ili ne deziras militi kontraŭ Sovetunio, ĉar niaj popoloj estas fratoj, ke nia frateco estas kunigita per sango sur Sipka². „Ni memoras, ke Rusio unu fojon jam liberigis nin, kaj ni ne deziras militi kontraŭ niaj fratoj!“ — tiel deklaris la bulgaraj oficiroj. Parolis ankaŭ la sovetaj korespondantoj — pri tio, ke la faŝismo baldaŭ estos definitive frakasita, pri la misio de la Ruĝa Armeo. Ĉefo de nia grupo estis la verkisto Vadim Kofjevnikov.

Ni demandis, kie estas la germanoj. La generalo respondis, ke ili jam forkuris el Ruse, sed ĉu germanoj estas en Sofio aŭ aliloke en Bulgario, li ne scias.

En la fino de tiu vespero al mi proksimiĝis nia korespondanto Vladimir Rudnij kaj diris: „Aŭskultu Dima, ĉu morgaŭ ni ne povas forveturi al Sofio?“ Mi respondis: „Ĉu eblas? Sed ni ne scias, kio okazas tie.“ Kaj li: „Guste tiel — ni ne scias. Sed ni ekscios. Ni veturos de Ruse al Sofio kaj ni vidos, kio okazas en Bulgario.“

Tute ne estis malfacile konvinki min. Ni iris al la generalo, apud li sidis Kofjevnikov. (Rudnij anticipe estis dividinta kun li sian ideon). Al nia peto pri ŝtombilo por veturi al Sofio kaj tie renkonti la sovetajn trupojn la generalo respondis, ke tio tute

ne estas malfacila. Li ordonis. Oni donis al ni aŭtomobilon kaj ŝoforon-soldaton. La generalo tamen avertis, ke li tute ne scias, kio okazas en la lando. Kofejnikov — ankaŭ.

La vesperon ĉiuj revenis en Gurgu, sed mi kaj Volodja restis en hotelo en Ruse. Frumatene ni ekveturis. Survoje — nenio fotinda.

Tagmeze krevis pneŭmatiko. Tio okazis proksime al izolita domo en kamparo. Dum ni ordigis la pneŭmatikon, al ni proksimiĝis vilaĝano. Li ĉirkaŭrigardis nin kaj rapide reiris en la domon. Post minuto li elkuris kun granda blanka pano kaj vinberoj, kriante: „Bratuški¹, saluton, saluton! Kiel mi ĝojas, kiel mi ĝojas. . .!“

Iom antaŭ Târnovo nin haltigis partizana patrolo. Ili estis vestitaj en ĉio ajn kaj havis diversajn armilojn — germanajn, anglajn. Ni haltigis la aŭton. Iom poste mi komprenis, ke la patrolo prenis nin por germanaj oficiroj. Ni estis en uniformo de militmaristo — kapitanoj-ingenieroj el la Nigramara Floto. Tiuj uniformoj estis malhelaj kaj la partizanoj ekprenis, ke ni estas faŝistoj — de SS. Ili proksimiĝis kun malicaj vizagoj. Sed kiam ili enrigardis tra la vitro kaj vidis la rugajn kvinpintajn stelojn sur niaj kapoj, ili eltiris nin el la aŭto, komencis brakumi kaj ĵeti nin en la aeron kaj krii: „hura!“

Kiel ni deziris fotti tiam, sed tio estis neebla — ili senĉese nin ĵetis supren kaj kriis „hura!“ . . .

En Târnovo oni kondukis nin al la stabo de la partizana taĉmento. Eble jam estis la Naŭa de Septembro. Oni gastigis nin, proponis al ni monon. Kompreneble, ni rifuzis, sed petis pneŭmatikon por la aŭto. Kaj ili disponigis al ni bonegan „Opel-Olimpia“, kies ŝoforo estis helpanto de la partizanoj kaj mem proponis veturigi nin ĝis Sofio. Mi pensas, ke tiu homo estis nomata Simeon. Ni revenigis la aŭtomobilon kun la soldato al Ruse kaj veturis plu. Sofion ni atingis, kiam jam regis la Patrolanda Fronto.

Nun mi pensas: kia aventuro fakte estis nia veturado! Sed la korespondanto devas ja vidi ĉion! Cu alimaniere ni povus por tuta vivo memori tiun ĉi septembran entuziasmon en Bulgario!

Vere, en neniu alia lando ni entreprenus similan aventuron. Ni estis konvinkitaj, ke sur la vojoj de Bulgario al ni povos okazi nenio malbona, ke la bulgaroj estas niaj fratoj.

¹ Fama bulgara prunbrando.

² Šipka — loko en la Balkano, kie okazis plej sango-verŝaj kaj decidaj bataloj inter rusoj kaj bulgaraj volontuloj unuflanke kaj turkoj — aliflanke.

³ Bratuški — el la rusa vorto «brat» (frato), t. e. fratejoj. Per tiu kar-nomo la bulgara popolo adresas sin al la rusoj.

Intervjuis: Panajot Denev

Dediĉe al la 36a datreveno de la naŭaseptembra venko

BOGDAN GLOGINSKI

LA SENLIMA KAJ LA NETAKSEBLA. . .

Kio estas senlima? La monto? La maro? La oceano? La ĉielo? Kaj kio estas netaksebla? La suno? La patrolando? La libero? La riĉaĵoj, kiuj dormas en la sino de la tero kaj morgaŭ modlos la estonton?

Jes — kio estas senlima kaj netaksebla? Jen demando, kiu supozigas multajn respondojn. Iam per la respondoj iuj sin ekzercas pri spriteco, aliaj per la respondoj strebas al saĝeco, triaj asertas, ke ne ĉiu estas kapabla eksenti la majestecon de tiuj ĉi kategorioj. . .

Sed la senlima kaj la netaksebla estas ĉiam ĉirkaŭ ni. Kaj en ni!

Antaŭ kelka tempo mi vidis en la vagonaro plorantan viron. Sajne nenio estas pli prema ol ploranta viro. La granda malfeliĉo estis trafinta kaj frakasinta lin.

— Povas esti, ke vi ĉion perdis, — konsolis lin homoj, — sed vi havas amikojn, sekve vi estas riĉa. . . Supren la kapo!

Kaj ili pravus. Unu el la senlimaj kaj netakseblaj trezoroj en tiu ĉi mondo estas la amikeco. La amikeco, la frata interhelpo estas miraklo de la mirakloj. Feliĉa tiu, kiu havas ilin!

La samo validas ankaŭ por la ŝtatoj. Tial ni komprenas, pro kio Georgi Dimitrov tiel emocias kaj bildece deklaris: nia amikeco kun Sovetunio estas kiel la suno kaj la aero por ĉiu viva estaĵo. Klare estas, pro kio ankaŭ kamarado Todor Jivkov eldiris la plej belan popolan benon por ĝi: de jarcentoj por jarcentoj!

La bulgara-soveta amikeco estas unika fenomeno ne nur en nia historio.

La radikoj de tiu amikeco estas tre profundaj, ili kuŝas en la tavoloj de tuta jarmilo; iliaj vivsukoj elŝprucis kun aparta forto antaŭ unu jarcento. Tiam el la alta tribuno de la franca parlamento la granda Viktor Hugo direktis sian potencon voĉon al ĉiuj parlamentoj kaj meridianoj:

EL BETONO KAJ GRANITO

Sur la plej alta supro de montpasejo de Trojan ekstaris nova majesta monumento el betono kaj granito, nomita „Arko de la Libero“. Ĝi esprimas la dankon kaj la amon de la bulgara popolo al la rusaj kaj sovetaj homoj, kiuj batalis por la libero kaj sendependeco de nia patrolando kontraŭ la otomana kaj faŝista jugoj.

Antaŭ la monumento brulas eterna fajro. Interne estas du haloj — ekspozicia kaj rita. Honore al la rusaj kaj sovetaj soldatoj-liberigintoj en Bulgario estas starigitaj pli ol 500 monumentoj.

— Oni ekstermas unu popolon... Ĉu ĉi tiu fakto havas atestantojn? Jes, nur unu atestanton: la tuta mondo!

Tamen la mondo ŝajnis sin blinda, trompata de siaj „oficialaj“ reprezentantoj el palacoj, el ministraj kabinetoj, el ambasadoj. Kio restis por la katenita kaj buĉata bulgara popolo? Nenio alia krom en maldormo kaj en sonĝo flustri:

— Se ĉiuj surdiĝus kaj ĉiuj blindiĝus, eĉ tiam Rusio aŭdos kaj vidos la maljustojn...

Kaj okazis ĝuste tiel. Ekmarŝis Ĝarŝin kaj Afanasiev, ekmarŝis kun sia ĵurnalista notlibreto Nemiroviĉ—Danĉenko, ekmarŝis miloj el apudvolgaj urbetoj kaj stepaj vilaĝetoj, marŝis Ivanoj kaj Stepanoj, Nikanoroj kaj Osipoj, Alekseoj kaj Pantalejmonoj. Popolo, soldatoj — ĉio kuniĝis en impeto por ekflugi tra Danubo kaj helpi la sklavigitan bulgaran fraton. Ili vadis en koto, frostotremis en neĝventegoj, ilia sango fluis apud Pleven kaj Nigra Akvo, mortis en lazaretoj apud Plovdiv kaj Sofio, kuŝiĝis en fratajn tombeojn apud Sipka kaj Sejnov. Ne estas angulo trans kaj maltrans de Balkano, kie ne dormas la blankaj ostoj de niaj liberigintoj...

Poste? Kaj birdoj kantis super la bulgaraj grenkampoj, kaj malhelaj nuboj pendis super nia lando, viciĝis ĝojoj kaj malĝojoj, kaj ĉio konfirmis unu nuran veron: nia plej certa protektanto kaj frato estas la lando de „bratuŝki“. En la infero de la monarkofaŝismo kaj kapitalismo, en la katastrofaj skuoj de la Dua Mondmilito helpe al ni alkuris ne aliaj, sed la nepoj de la iamaj brjanskanoj kaj orlovanoj. Kaj poste, kiam ni devis elrampi el la polvo kaj la ŝlimo de la ekonomia detruo kaj postresto, denove ili etendis manon al ni.

Sed ne la muzeoj estas la ĉefa argumento de tiu amikeco, ne la arkeologiaj elfosaĵoj, ne la lernolibroj de historio, ne la arkivoj, ne la ekskursgvidantoj. Tiu ĉi amikeco ĉirkaŭverŝas nian tutan hodiaŭan tagon, ĝi estas la plej viva kaj plej verda arbo en la nuntempa bulgara ĝardeno. Sidante ĉe la fenestro, marŝante tra la kamparo — ĉiam kaj ĉie ni vidas ĝiajn manifestadojn kaj fruktojn. Jen afiŝo kun la unua bulgara kosmonaŭto. Jen „Moskviĉ“ kun veturanta familio. Traktoro kun plugiloj. Kombajno meze de matura tritiko. Uzino en la piedoj de Balkano. Poŝtisto kun letero de nia studento en Moskvo. La romano „La kvieta Dono“ sur nia tablo. La certaj kaj nealireblaj limoj de nia popola respubliko. Neeble estas nombri ĉion, kion donas al ni la bulgara-soveta amikeco.

Eksterlandaj gastoj de Bulgario nefoje miras: kiaj faktoj? Mekanikistoj el la sovetaj regionoj Azovskij kaj Mjasnikovskij venas por rikolti kaj draŝi en la blokoj de Pleven-distrikto kiel en plej amata grenkampoj. Specialistoj el Kremenĉug helpas al laboristoj en Debeleĉ pri la organizado de la laboro kaj pri serĉado de plej ĝustaj teknikaj solvoj. En la traktor-

uzino de Karlovo oni aŭskultas. la konsilojn de inĝenieroj el Poltavo. Bulgaraj specialistoj veturas al la institutoj kaj kombinumoj de Leningrado. Du popoloj, du landoj vivas kiel frato kaj fratino!

— Vere interese! — ekkrias la eksterlandaj gastoj. — Kia kontrakto ĵetis vin en tian nedisigeblan brakumon?

Ne estas malfacile respondi. La kontraktojn oni subskribas per inko, kaj la nia estas subskribita ne nur per inko! Oni ilin konfirmas per stampo, kaj la nia portas ankaŭ alian alojon. Ratifikas ilin parlamentoj, kaj la nia estas benita ne nur per levo de parlamentanaj manoj. Ĝi estas skribita per la signoj de komuna alfabeto. Ĝi la tuta estas teksita el la komune verŝita sango kaj ŝvito. Kiel neviŝebla stampo sur ĝi kuŝas frataj tombejoj kun blankaj soldatoj.

Kaj la plej grava: ĝi la tuta estas lumigita per la ratifiko de la plej certa, plej granda garantio: nia komuna kredo je la triumfo de la komunismo.

Jen tio estas la bulgara-soveta amikeco: ĝi venas el la pasinteco, floras kaj maturiĝas en la nuntempo, por doni ankoraŭ pli abundajn fruktojn en la estonteco. Fenomeno senlima kaj netaksebla. Heroldo de la rilatoj inter la popoloj en la morgaŭa pli perfekta mondo!

„Pirin kantas — 1980“: popola kutimo el vilaĝo Jakoruda.



MANIFESTAĴOJ DE LA POPOLA ANIMO

„PIRIN KANTAS—1980“



Dum la lastaj du suno-plenaj tagoj de aŭgusto el ĉiuj anguloj de Pirin-regiono ĉe Predel¹ kolektiĝis kantistoj kaj ludistoj, rakontantoj kaj famaj rondodancantoj — la viva popola animeco, konservita tra la jarcentoj en sono, vorto kaj koloro.

Tio estis dekoj da kantgrupoj, novjaraj gratulantoj, nuprofestantoj, blankharaj ŝalmistoj — ricevintaj de multaj pasintaj generacioj ne nur la gentan sangon, sed ankaŭ la heredan emon al melodio, ritmo kaj kolorharmonio.

La dekoj ambaŭflanke de Predel alprenis la tondradon de ritaj tamburoj, la diskantajn voĉojn de ĵajnaj kordoj kaj ebonaj ŝalmetoj, la kantojn de junulinoj kaj sveltaj junedzinoj, resendis alin al la arbaroj kaj en la sabata frumateno la monto ekkantis.

Dum la unua tago de la kvara festivalo de folkloro „Pirin kantas-80“ sur Predel estis aŭskultitaj pli ol 6000 plenumantoj de kantoj kaj popolinstrumentoj, de dancoj, ritoj kaj spektakloj sur ses estradoj, antaŭ dek miloj da spektantoj.

Super ĉio dum tiu festivalo dominis la ĉiovenka popola kanto. Plenumita de apartaj kantistoj kaj kantistinoj, de viraj kaj virinaj kantgrupoj, ĝi estis prezentita

en sia tuta melodiriĉeco, tiel karakteriza por la loka vokala folkloro. Komencigante de la nuptokantoj de vilaĝo Gabrene kaj finiĝante per la elegia beleco de la kantoj de fratinoj Emilija kaj Svetla de vilaĝo Dolen, la tuta repertuaro de la festivalo-konkurado estis emocia rakonto pri la angoroj, ĝojoj kaj esperoj de la ĉi-tieaj homoj. Pri la fekunda tero, pri naskiĝoj kaj nuptofestoj, pri impetaj amuzadoj kaj intimaj homaj sekretoj.

Pruvo pri la senlimaj eblecoj de la popola talento estas ankaŭ la fakto, ke en la plenumo de kelkcentoj da popolkantoj eĉ la plej precizaj fakuloj tute ne povis malkovri ripeton ne nur en la apartaĵoj de la plenumoj, sed ankaŭ en la vortriĉaĵo de la diversaj tekstaj variantoj.

Kompare kun la antaŭaj tri festivaloj, en „Pirin kantas — 80“ konsiderinde pli varie estis prezentitaj la popolkutimoj kaj ritoj, konservintaj dum multaj labor-kaj festotagoj la vivosaĝon kaj la homan etikon de nia popolo. Aparte vaste estis prezentita la infana folkloro. Kelkaj el la infangrupoj plenumis tiel sincere kaj kaplante siajn ludojn kaj kantojn, kvazaŭ ili estus forgesintaj kaj la estradojn, kaj la publikon.

Ĉe ĉiu estrado la organizantoj estis aranĝintaj malgrandajn etnografiajn ekspoziciojn pri la koncerna regiono. Tio estis ebleco mon-

tri ne nur la materialan kulturon de la vivmaniero, sed ankaŭ la neimageblan riĉecon de koloroj kaj simboloj, de brodaĵoj kaj kudraĵoj, kreitaj de la fantazio kaj arttalento de la ĉi-tiea virino dum la plej pezaj jaroj de subpremo kaj nigra sklaveco.

La serĉado de ĉiuflanka estetika efiko de la tradicio sur la nuntempulon estas ĉefa celo de la folkloraj festivaloj „Pirin kantas“. Al tiuj ĉi problemoj estis dediĉita ankaŭ la scienca sesio pri esploro de la folkloro heredado de Pirin-regiono, okazinta en Blagoevgrad² tuj post la fermo de la festivalo.

La vesperon post la festivalo sur Predel ekflamis fajroj, la steloj malsupreniĝis, eksilentis voĉoj, ĝadulkoj³ kaj liutoj, kaj la festo daŭris en la animoj de la homoj.

La solena koncerto, kiu okazis la sekvan tagon, kolektis sur la superverŝitaj de roso kaj suno herbejoj de Predel pli ol cent mil homojn. Denove levis voĉon la sakflutoj kaj ŝalmoj, eksonoris tintiloj, ekkantis centoj da kantistoj kaj kantistinoj. Kaj en tiu ĉi hela nubo el kantoj, homoj kaj suno ĉiu travivis ne zorge pripensitan scenaron aŭ artan spektaklon, sed la manifestigon de sia propra animo, la tremon de la komuna sango, kiu ligis kaj ligas la homojn tra multaj riverbasenoj kaj rokoriĉaj montokrestoj, tra multaj jaroj kaj tutaj jarcentoj.

¹ Predel — loko infer la montoj Pirin kaj Rila.

² Blagoevgrad — la distrikta centro de tiu regiono.

³ „Ĝadulka“ — guzlosimila trikor-da popola muzikinstrumento.

*Inter la blindaj civitanoj de nia lando ne estas malmultaj tiuj, kiuj partoprenis la kontraŭfaŝisman batalon. Inter ili estas ankaŭ nia samideano **KIRIL MANOV SAVOV**, loĝanta en Sofio. Li estas vigla, ĉiam bonhumora homo kun riĉa vivosperto. K-do Manev bonege memoras la pezajn jarojn de la kaŭzalismo kaj monarkofaŝismo kaj interese rakontas pri ili. Ni petis lin dividi kun niaj legantoj siajn travivaĵojn el tiu tempo.*

Mi naskiĝis en malriĉa vilaĝana familio en vilaĝo Gabrovdol. Pro malsaniĝo mi, 7-jara, tute perdis la vidkapablon de unu okulo kaj duone de la alia. En 1943 j., arestita kaj turmentita en la Direkcio de la Polico en Sofio, mi komplete blindiĝis.

Kiel junulo mi tre ŝatis ludi violonon, sed en 1937 enamiĝis al la akordiono kaj ne disiĝas de ĝi ankaŭ nun.

E-on mi lernis en 1928 j. en la Instituto de Blinduloj en Sofio. Nia amata E-lektoro estis k-do Asen Grigorov. Li inspiris en niajn korojn amon al la homamaj ideoj de E-o kaj la komunismo.

Kun multaj eksterlandaj e-istoj mi korespondis ĝis nun. Jam en 1929 j. mi ekhavis leterkontaktojn kun sovetiaj blindaj e-istoj. La E-rondo en nia lernejo organizis la eldonadon de la unua en la mondo E-gazeto en brajlo sub la nomo „Fajrero“. De ĝi aperis kelkaj numeroj.

E-o ludis gravan rolon en mia tuta vivo. Mi tutkrede ĝin amas. Regule mi membras en nia blindula E-societo „Balkana Stelo“, mi kantas en la ĥoro ĉe Asocio de Blinduloj en Bulgario kaj ankaŭ en la Ĥoro de Sofiaj E-istoj.

Frue mi aliĝis al la noblaj komunismaj ideoj. Mia pli aĝa frato estis kudristo kaj komunisto, amiko de Slavčo Petrov (poste fama partizankomandanto sub la nomo Slavčo Radomirski), same kudristo, komunisto kaj e-isto. Li naskiĝis en najbara vilaĝo Elovdol. Ankaŭ mi amikiĝis kun Slavčo.

Mi partoprenis en ĉiuj iniciatoj de la Komunista Partio — unuamajaj manifestacioj, mitingoj ka. Ekzemple lige kun la Nova Jaro 1934 estis organizita granda amuzvespero en salono de la tiama urba kazino — str. „Gurko“. I. Ĝi estis organizita de la sindikato de sukeraĵaj laboristoj. Tiu tempo mi estis tre bona amiko kun la elstara antifaŝisto-e-isto Nikola Sopov — sekretario de la Laborista E-Asocio. Mi alkondukis orkestron, kiu ludis senpage. Ĉirkaŭ 2000 personoj kolektiĝis kaj post artprogramo vigle ekdancis kaj kantis. Subite invadis policianoj, komenciĝis batalo, la policianoj pafis. Estis vunditaj kelkaj laboristoj. Duono de la ĉeestantoj batalis kontraŭ la polico, ĉar ĝi ordonis, ke ni ĉesigu la amuzvesperon, la alia duono tamen plue dancis kaj kantis. Falis mortigita 18-jara junulo, Stojančo el v. Bebrovo, kudristo.

Venis ankoraŭ pli peza tempo — la 40aj jaroj. En Eŭropo bolis la milito. En 1942 j. Slavčo Radomirski konatigis min kun Violeta Jakova, aktiva antifaŝistino, kiu kaŝis sin kaj loĝis eksterleĝe en Sofio (poste ŝi iris al la partizantaĉmento de Trân). Tiu tempo mi loĝis en kv. Lozenec, proksime al lernejo „Penčo Slavejkov“.

Foje, proksimiĝante al mia domo, mi aŭdis du pafvojn. „La ĝendarmoj komencis persekuti iun...“ — ekpensis mi. Enirinte hejmen mi funkciigis la radion kaj eksidis. Post nelonge aŭdiĝis atenta frapado sur la pordo. Mi malfermis. Violeta!

— Ĉu oni pafis post vin?

— Jes, sed tio estis malproksime. Neniu postkuris min.

Mi kuŝiĝis ŝin sur la liton de mia edzino, kaj mi mem ekkuŝis sur la ripozsofo. Mia loĝejo estis malvasta.



Frumatene aŭdiĝis frapoj sur la pordo.

— Kiu — tiel frue?

— Polico!

— Polico — bone. Sed ĉu ne eblas iom mallaŭte? Ĉi tie estas malgranda dormanta infano.

— Kiu loĝas ĉi tie? Donu viajn legitimilojn! Ĉu estas ĉe vi fremda homo?

— Jes, unu knabino estas ĉe mi, ŝi laboras en la kuirejo de la germana tendaro, Ganka Stojanova Neŝeva el Oreŝak, Trojan-regiono. Sed legitimilon ŝi ne havas ĉe si, ĝi estas tie, en la tendaro. Se vi volas, vi povas kontroli.

Vere ekzistis Ganka Stojanova, amikino de nia familio, sed en la momento ŝi tute ne estis en mia domo.

— Nu, lasu la blindulon, — diris unu el la policianoj. — Li estas nia homo, ĉiuj ni konas lin.

Ili foriris al la pordo de mia frato. La blokado daŭris ĝis posttagmezo. Kiam ĝi finiĝis, mi kaptis Violeta-n subbrake kaj per la tramo ni atingis la urbocentron. Ĉi tie Violeta lasis min kaj perdis en la homamaso.

En la printempo de 1944 pro la bombadoj mia familio evakuiĝis en nian naskiĝvilaĝon Gabrovdol. Ankaŭ mi iris tien.

Ĉi tie mi laŭpove helpis la partizanojn. La regpoto estis malforta, la partizanoj longe restis en la vilaĝanaj domoj — la popolo ĉiel subtenis ilin. En tiu tempo aparte bonan rolon ludis mia akordiono. Kun ĝi mi ĉirkaŭadis la vilaĝojn, ludis por la junuloj en iliaj domoj ĉe nomfestoj, en amuzvesperoj ka. Ĉie mi kantis ankaŭ novajn, partizanajn kantojn, kiujn la junaj homoj lernis de mi. Ofte la partizanoj okupis armile iun vilaĝon, arestis la regantojn kaj

se iu el ili estis montrinta sin tre fervora servanto al la faŝista aŭtoritato aŭ faris malbonon al la partizanoj, oni juĝis lin publike, sur la vilaĝplaco, en la ĉeesto de la tuta loĝantaro. Unue ĉiam parolis iu partizano pri la situacio en nia lando kaj en la mondo, poste okazis la popola juĝo, fine la partizanoj kantis kaj la tuta loĝantaro volonte kunkantis. Mi ludis per la akordiono. Por ke la polico poste ne punu min, partizanoj ĉiam venis hejmen kaj kamufle arestis min, kvazaŭ mi perfortite iras kaj ludas.

Multo estis travivita dum tiuj jaroj, sed mi rakontos ankoraŭ nur pri unu interesa okazaĵo.

En kunveno de la partia aktivularo en Gabrovdol la komandanto de la partizantaĉmento „Georgi Dimitrov“ starigis la taskon pri senarmigo de 14 soldatoj kaj unu suboficiro, kiuj pasigis sian forpermeson en nia vilaĝo. La armiloj estis necesaj al la taĉmento.

Mi konis la suboficiron — Todor Stojčev el vilaĝo Kalajĝilar (nun Prisojna), regiono de Omurtag. Li havis fraton kaj fratinon, kaptitajn kiel partizanojn de la taĉmento de Gorna Orjakhovica kaj ĵetitajn en malliberejon. Lia domo en Kalajĝilar estis bruligita de la faŝistoj.

Mi raportis pri ĉio ĉi al la taĉmentestro, kaj li petis min arangi por li renkontigon kun la suboficiro. Tion mi faris.

Ce la renkontigo la suboficiro promesis helpi la taĉmenton havigi al si kartoĉojn — pere de sia kuzo, kiu estis estro de armilprovizejo en la kazerno de Piroto.

Kaj en une varmega julia tago mi, kun akordiono surdorse kaj kofro en la mano, akompanata de miaj edzino kaj 8-jara infano, eniris la atendejon de la stacidomo en Piroto. Rimarkinte la akordionon kvar soldatoj, irantaj forpermesi, invitis min al si kaj petis min ludi. Mi volonte faris tion. La ludado daŭris longe, ĉar la vagonaro malfruis. Kiam fine ĝi alvenis, mi, la edzino kaj la infano envagonegis kune kun la soldatoj kaj en la kupeo la amuzado daŭris.

La militpolico ordinare estis en la unua vagono post la lokomotivo, mi sciis tion kaj preferis esti tie, sed nun estis nenature rifuzi al la soldatoj.

Post kelka tempo la konduktoro avertis, ke oni pretigu siajn pakajojn — la militpolico faras kontrolon.

La policanoj kontrolis la pakajojn de la civilulo kaj junulino, kiuj estis en mia kupeo, sed mian blindulan simplan kofron eĉ ne tuŝis.

— Kial vi ne venis al ni kun la akordiono? — demandis unu policano.

— Ĉi tien kun la soldatoj... — diris mi. — Sed ankaŭ al vi mi venos — laŭvice la muelilo muelas...

Iu policano levis la akordionon, prenis min subbrake kaj ekkondukis min al la unua vagono.

— Kaj la pakajojn? — demandis la policano.

— Ĝi restu ĉe la edzino, — mi respondis kaj forte puŝis la lignan kofron sub la piedojn de mia edzino. Ŝi sidis tute trankvila, opiniante, ke en ĝi estas hufonajloj, ege mankantaj tiutempe.

Ĝis Sofio mi ludis al la policanoj kaj ili regalis min per greka konjako.

Sofion ni alvenis vespere, jam en mallumo. Ĉe la kajo la edzino etendis al mi kun peno la negrandan, sed pezan kofron. Mia patro atendis nin kun ĉevalveturilo.

La sekvan vesperon la partizanoj en unu vilaĝo apud Radomir ĝoje malplenigis la kofron: en ĝi estis 1100 kartoĉoj por aŭtomata pafilo.

Lige kun la 70a datreveno ekde la naskiĝo de D. Kaljaŝki

KRUM KJULJAVKOV

DIMITRO KALJAŜKI

Vualis Osogovo'n¹ nokt' obskura.
La nub' tegmenton vastan jen etendis,
kaj ĉio dronis jam en dorm' plezura.
Nur denuncanto en maldorm' atendis.

Perfidis iam pop' la apostolon²,
vin same tiel denuncanto trafis.
Kaj same kiel Levski per pistolo
sentime kontraŭ malamik' vi pafis.

Pro l' paf' rompiĝis la silent' vilaĝa:
vi kuŝis jam senmova, mortigita,
kaj cirklon markis via sturm' kuraĝa,
vin la murdist' rigardis timigita.

Junul', ekkantu kanton vi bravulan!
Rakontu, maljunul' al la neparo,
Kaljaŝki kiel falis, kuraĝulo,
ni kiel gajnis la liberon karan!

El la bulgara: D. Haĝiev

¹ Osogovo — montaro en Sudokcidenta Bulgario — en kies piedoj situas la naskiĝvilaĝo de Kaljaŝki — Jilenci, distrikto de Kjustendil. Kaljaŝki estis elstara funkciulo de Bulgara Komunista Partio, sindona kontraŭfaŝisma batalanto. Je 28.02.1943 li, organizanto de la partizana movado, estis denuncita de fihomo kaj pereis de policana kuglo.

² La apostolo de la libero Vasil Levski.

Il Premio de la literatura

kronkurson — tradukita poezio

SERGEJ OSTROVOJ

LA MILITO

Kvin jarojn min milito batis.
Ĉu tio multe? Aŭ malmulte?
Kvin jarojn ĝi min mortpafadis.
Ĉu tio multe? Aŭ malmulte?

Mi paŝis tra l'milit' kvin jarojn.
En ĝia akvo. Ĝiaj fajroj.
En ĝia plumbo kaj diboĉoj.
Tra la obusoj. Tra l'kartoĉoj.

Ĉe plago plag'. Kaj mort' ĉe l'kor'.
Sed al la mort' mi diris: «For!»

Kaj morto min ne tuŝis jam.
Do, mi pli forta ol la flam'.

Pli ol la sort'? Ol la turmentoj?
Ol plumb' ŝiranta je fragmentojn?
Ol ŝtonaj krioj kaj malbenoj?
Ol tero griza pro ĉagrenoj?

Ne, kiu ajn event' sur ĝi,
mi — forta pli! Mi forta pli!
Mi turnas min al vi, vivantoj.
Al vi, obeliskar' en kampoj.

Al antaŭul'. Al samtempul'.
Al ĉiuj homoj de futur':

ne inventita tia forto,
per kiu min forfalĉus morto!
Bombardis min metalskualo —
mi pli firmiĝis ol metalo.

Osvencim-fornoj muĝe blekis —
terglobon mi surŝultrea metis,
ke fajr' estingu fajron ĉi,
ke brulu for malbon' en ĝi..
Ho, mia vago tiom foris,
ke eĉ post min anĝeloj ploris.
Do, mi brakumos vin per lum',
al mia koro fidu nun.

El la rusa: Nikolao Fedotov

Interjuis: Kunčo Válev

FRATA SALUTO

Al vi, niaj fratoj bulgaraj,
ni sendas gratulojn de l'koro!
Pri la liberiĝ' epokfara
ni ĉiam konservu memoron!

Septembro la Naŭa estas
ĉapitro de l'gloro popola.
Por via popolo ĝi restas
pri la percintoj konsolo.

Por via popolo la dato
simbolas liberan ekziston.
Ne vane pereis soldatoj,
venkinte la monstrolon faŝistan!

Kun mia popol' man-en-mane
antaŭen marŝas bulgaroj.
Do estu feliĉaj kaj sanaj,
sukcesu en ĉio vi, karaj!



DIMITRO PETROV

MİŞA — LA VENKINTO

La XXII olimpikoj en Moskvo finiĝis. Ĉiuj ni de mateno ĝis malfrua vespero spektis la konkuradojn, kaj neniu riproĉis la ceterajn, ke ili deflankigas de siaj laborlokoj kaj ne mallevas la okulojn de la televidaparatoj.

Por esti precizaj ni diros, ke la olimpikoj ne nur finiĝis, sed ankaŭ komenciĝis kaj okazis. Se oni tamen dum tiuj tagoj estus rigardanta la televidon de kelkaj okcidenteŭropaj landoj kaj legus ties aŭtoritatajn ĵurnalojn, oni povus esti certa, ke olimpikoj ne okazis. Aŭ se io simila okazis, ĝi estis tute pala kaj malatentinda. Malgraŭ la insistoj de la spektantoj kaj legantoj la plimulto da rimedoj por amasinformado en tiuj okcidenteŭropaj landoj ne decidis speguli la „malinteresajn“ ludojn kaj tiel ankoraŭfoje montris, ke ili estas vere „sendependaj“.

Kelkaj okupiĝis pri elsendoj pri la tiel nomataj „grandaj ludoj“ de la antiolempikulo Karter en Filadelfio, kie oni atingis du, sed tamen eksterordinariajn rekordojn: pri plej malalta vizito kaj pri manko de rekordoj... Tio ankoraŭfoje konvinkis nin, per kia „objektiva“ informado estas provizata la tiea civitano. Ĵurnaloj kaj gazetoj en Usono kaj Sudafrika Respubliko, en Tajlando kaj Sud-Koreo provis konvinki la leganton, ke dum la moskvaj olimpikoj oni atingis nenion notindan. La agentejo DPA sciigis el Hamburgo, ke la programo de la malfermo de la ludoj „ne vekis intereson“, ĝi estis „enuiga“. Kaj la

Dua premio en la literatura konkurso — originala poezio

PENKA PAPAŴOVA

MI ESTAS PARTETO DE VI

Mi estas parteto
de tiu vivo,
bela
kaj malfacila.
Mi estas
grengrajno
de peza spiko,
la vivon
en sia koro
kaŝinta.
Sablero
mi estas
de tiu tero,
por ĉio
trovinta
la fortojn.
Mi estas parteto
de ĝoj

kaj doloro,
kiuj brilas
en niaj okuloj:

Mi estas parteto
de bravaĵo revo,
kiuj ekiris
la vojon
al la koro!

Mia bela patrujo,
kunodoro
de pano,
kun blankaj
uzinoj,
mi estas
parteto
de vi!

brita ekstera ministro lordo Karington apelaciis, ke oni ne permesu al la rusoj fari tiun „propagandan venkon“.

Sed ni aŭdu ankaŭ aliajn okcidentanojn, kiuj tamen vizitis la XXII olimpikojn en la soveta ĉefurbo. „Vanaj estis la timoj, ke mankos naĝistoj el Usono kaj GFR. En Moskvo la konkurado en ĉiu disciplino estis tiel forta... Mi neniam partoprenis pli fortan konkuradon“ (Gudju, olimpika ĉampiono el Anglujo).

„Tiu ĉi impresanta festo estis vera himno de la sporto“ (Krespi, prezidanto de la Internacia Asocio de Sporta Gazetaro).

„Mi spektis multajn sportajn festojn, sed kiel ĉi tiun — unufoje“ (Deven, ĝenerala sekretario de la sportaj federacioj en Belgio).

„Mi pritaksas la organizadon de la boksaj turniroj kiel la plej bonan el la tri lastaj olimpikoj“ (Hil, prezidanto de la Internacia Asocio de Amatora Boks).

„Mi vizitis 127 landojn, sed tian modernan sportan bazon kaj rilaton al la disvolvado de la sporto nenie mi vidis. Vi kreis bonegajn kondiĉojn por la olimpikoj“ (Avelanĵ, prezidanto de FIFA).

„Mi ĉeestis la olimpikojn en Meksiko, Munkeno kaj Montreal kaj mi povis kompari. Mi estas ravita de la bonegaj kondiĉoj, kreitaj de la organizantoj de moskvaj ludoj“ (Ŝrajber, ĝenerala sekretario de Internacia Asocio de Sportpaŝado).

„La artprogramo de la inaŭguro de la olimpikoj estis belega arto de plej alta klaso“ (el korespondado de la itala ĵurnalo „Paeze Sera“).

Oni povas eldoni tutajn volumojn da entuziasmaj opinioj de konkurantoj, specialistoj kaj publiko, kiuj havis la plezuron konkuri aŭ spekti per propraj okuloj tiun ĉi raran, grandegan feston de la homa spirito.

Do, tiu simpatia Miŝa faris bonege sian laboron. La plej elstaraj sportistoj el 80 landoj plibonigis la plejmulton de la mondaj, olimpikaj kaj propraj rekordoj. Ni, bulgaroj, multe ĝojas pri la sinprezento de niaj sportistoj, kiuj okupis la trian lokon post USSR kaj GDR.

La veraj sportistoj el la tuta mondo komencas prepari sin por la sekvaj olimpikoj, kaj la malamikoj de la olimpismo — iel malhelpi ilin. Ni, la ordinaraĵoj spektantoj, ankoraŭ longe estos sub la impresoj de la noblaj olimpikoj en Moskvo, kiuj ankoraŭfoje impone manifestis la volon de la popoloj vivi en paco kaj amikeco.

¹ Miŝa — en rusa lingvo karesnomo de urso, do „urso“ (simbolo de la moskvaj olimpikoj).

*Estimataj gastoj!
Karaj gekamaradoj!*

Ni restus izolita insulo en la oceano de la vivo, soleca grupo da bonintencaj idealistoj, se ni agus



preter la problemoj de la vivo, aparte de la aliaj amasorganizaĵoj, neglektante la rekonon de la lokaj respondecaj instancoj, en kies manoj troviĝas la gvido de la socia opinio. Eble per tiuj ĉi vortoj mi ne malkovras iun Amerikon. Sed ofte aŭdiĝas plendoj, kiuj estas nekonataj al ni, la e-istoj de urbo Polski Trâmbeș. Guste pro tio mi derizas diri kelkajn vortojn pri nia modesta sperto.

Jen freŝa, ĉi-jara ekzemplo. Tute neatendite samideanoj el la sovet-urbo Tiŝvin, niaj literamiko, sendis al ni grandan pakadon da olimpikaj afiŝoj. Tuj ĉi ni naskiĝis ideo: ĉu ni ne povas aranĝi ekspozicion dediĉe al la moskvaj olimpikoj? El materialoj ne nur el USSR, sed ankaŭ el aliaj landoj. La respondo estis: jes, aranĝi, sed nepre kune kun aliaj organizaĵoj kaj nepre starigi la demandon ĉe la respondecaj instancoj de la urbo.

La ideo estis tuj aprobita. Sub la gvido de la urba komitato de BKP okazis kunsido. Estis elektita preparkomisiono kaj aprobita la de ni proponita plano. Distribuitaj estis la taskoj. Nia E-societo ricevis la devon havigi eksterlandajn materialojn kaj sa-

**EL LA DISKUTADO DUM LA
40a JUBILEA KONGRESO**

KUNE KUN LA ALIAJ SOCIORGANIZAĴOJ!

Eldiro de ĀRISTO MANOLOV

lutleterojn. La komitato de Patrolanda Fronto, la Komitato de Bulgara-Soveta Amikeco, la Porpaca Komitato k. a. devis pagi ĉiujn elspezojn — poŝtajn, propagandajn ka. La Kultura Domo kaj la Sporta Societo „Jantra“ alprenis la taskon pri la teknika aranĝo de la ekspozicio pere de sia personaro kaj aktivularo.

Ĉio komenciĝis kaj finiĝis laŭ la plano. La ekspozicio estis malfermita oficiale de la sekretario de la Urba Komitato de Bulgara Komunista Partio en ĉesto de la tuta urba aktivularo kaj alia publiko. Oni povis vidi, ke el 23 landoj estas venintaj pli ol 260 ilustraĵoj, afiŝoj, sportaj revuoj, fotoj ktp. kun interesaj informoj pri la sporta kaj porpaca agado en tiuj landoj kaj ke tio povis esti atingita per la helpo de la Internacia Lingvo. Tion substreki ankau la ĉeestanta prezidanto de la Distrikta Konsilantaro pri Fizika Kulturo kaj Sporto k-do Nedev.

Nur post dek tagoj, laŭ lia propono, interkonsente kun la Urba Partia Komitato en la distrikta urbo Veliko Tŕrnovo, nia ekspozicio sub titolo „Por paca sporta konkurado, por paco kaj amikeco inter la popoloj“ jam troviĝis tie, ĝuste en la tago, kiam alvenis la olimpika fajro. La ekspozicion povis vidi fakte la tuta aktivularo de la vilaĝoj kaj 14 urboj de la distrikto, ĉar dum la sama periodo kaj en la sama salono okazis sesio de la Distrikta Popola Soveto. Ĉiuj nepre estas rimarkintaj, ke kune kun la torĉo de la olimpika fajro gaje brilas la verda stelo de E-o — du simboloj de la komuna batalo por komuna celo.

La alilandaj materialoj, tute aŭtentikaj, kaj la voĉlegitaj salutleteroj de alilandaj sportaj agantoj kaj sportamikoj pruvis, ke ĉie la ordinaraĵoj homoj apogas la noblan celon de la moskvaj olimpikoj, sendepende ĉu iliaj registaroj estas por aŭ kontraŭ la tiel nomata bojkoto. Tiamaniere ni povis kontribui al popularigo de la olimpikoj kaj por senvualigo de la senhontaj instigantoj de „la malvarma milito“.

Sed oni povas diri al ni: jes, vi faris ion gravan en politika senco. Sed por Esperanto? La respondo estas: ni ĉiuj povas atingi bonajn rezultojn POR E-o, se ni bone laboras PER E-o!

Kiel rezulto de nia labormaniero ĉiuj pordoj por ni estas malfermitaj. Regulaj aŭ subtenantaj

membroj de nia E-societo estas la prezidanto de la Urba Komitato de Patrolanda Fronto, la sekretario de la Komunuma Komitato de Komsomolo, la respondeculino pri la propaganda laboro de la partia komitato, la vicdirektoro de la gimnazio ka. La Patrolanda Fronto regule subtenas nin finance. En la gimnazio la instruado de E-o estas pagata. La kotizon de la instruistino, kiu vizitas la ĉi-jarajn internaciajn kursojn en Varno, pagis la lernejo mem. Pro la bonaj organizaĵaj interrilatoj la prezidanto de nia E-societo estis elektita kiel vicprezidanto de la packomitato kaj dum la lasta distrikta porpaca konferenco en V. Tŕrnovo li estis petita rakonti pri la porpaca laboro pere de E-o en nia urbo, pri niaj komunaj entreprenoj okaze de la Internacia Jaro de la Infano ka.

Nature, konkerinte oficialan apogon, ni plifaciligas la perspektivojn rilate al la konkero de la amasoj. Sed tio estas alia problemo, pri kiu eble iu alia parolos ĉi tie en la kongreso.

Konkludo: Kiel e-istoj ni ne devas stari ekster la vivo de niaj urboj kaj vilaĝoj, sed aktive partopreni ĝin. Agi man-en-mane kun la aliaj organizaĵoj, sed ne izolate de ili. Ne murmuri kaj ne plendi, sed labori, proponi, insisti, postuli — des pli, ke nia agado koincidas kun la pacaj streboj de nia popolo, kun la paca politiko de nia lando. Ne atendi morgaŭ aŭ postmorgaŭ en kondukon de E-o „el supren“, sed labori malsupre en la nuna tago kaj pruvi la neceson de la E-laboro por la progresigo de nia socialisma patrolando, por la triumfo de la paco. Nur tiel kaj nepre ĉie, en urboj kaj vilaĝoj, ni povus konkuri la helan supron de la dezirata venko.

„BULGARA ESPERANTISTO“

oficiala organo de Bulgara
Esperantista Asocio

Grandformata, ilustrita, 12 numeroj jare, abonprezo por 240 paĝoj tute modesta — 2.90 levoj. Por socialismaj landoj — 5.42 levoj por nesocialismaj — 5.90 levoj.

Abonu tuj! Ne atendu la lastan tagon — la 10an de decembro! Abonigu aliajn!

TURISTOJ PROPAGANDAS E-ON

La deko da societoj en Sofio agas sufiĉe bone. Kelkaj el ili havas tute regulajn ĉiusemajnajn kunvenojn. Tamen oni konstatas, ke la e-istoj en la ĉefurbo havas sporadajn kontaktojn kun la urbanoj, kiuj ankoraŭ ne scipovas E-on. Lastatempe la plej granda sofia E-Societo „Maksim Gorkij“ aktivigis siajn ligojn kun la kulturaj domoj. La koruso „Esperanto“ aranĝis koncerton en la kulturdomo en kvartalo „Geo Milev“. Pro la aktivaj kontaktoj kun du tiaj domoj estas preparataj E-kursoj por la nova lernejo.

Turista sekcio „Esperanto“ ankaŭ komencas kontribui al la klopodoj tiurilate. Laŭ rekomendo de la komisiono pri turismo de BEA ĝi decidis partopreni la ĉiujaran amasan grimpadon al la plej alta pinto de monto Vitoŝa — „Cerni Vrah“ (2260 m), kiu okazas dum la lasta semajno de aŭgusto.

Al nia alvoko partopreni la grimpadon reĉis 30 gee-istoj. La 30an de aŭgusto parto de ili marŝis al la sekcia turista domo „Esperanto“. La sekvan tagon frue ni ekiris al la montopinto. La belega vetero kontribuis al la sukceso de la aranĝo. Pro la insistado de kelkaj fervoruloj, la E-parolo estis tre ofte aŭdata. Al centoj da turistoj ni donis flugfoliojn pri la lingvo. Alia konvena formo por atentigi la ĉeestantojn de la aranĝo pri nia partopreno estis la funkciigo de granda flugilo el papero, sur kiu estis pentrita granda verda stelo kaj la litero „E“. Multaj turistoj, rigardante la flugilon, kiu ŝvebis je distanco de 200 m super la amaso, demandis kial la stelo estas verda kaj kion signifas la litero en ĝia mezo. Rimarkinte la flugilon, kelkaj neorganizitaj e-istoj aliĝis al nia grupo.

Kontentaj ni revenis al Sofio tra la ŝtata rezervejo „Bistrica“.

La rezultoj de tiu ĉi aktiva partopreno en tuturba turista aranĝo inspiras nin partopreni estonte en similaj aranĝoj amase kaj bone preparitaj.

NIK

SUKCESA E-KURSO

Sukcese finiĝis E-kurso en la plej grandaj komercaj entreprenoj en Bulgario „Tehnoeksport“ kaj „Tehnoimport“. En solena kunveno de la Urba E-Societo „M. Gorkij“ oni enmanigis atestojn al la sukcese finintaj la kurson.

Ili ĉiuj deziras korespondi kun ĉi pri ĉi. Komuna adreso: Bulgario, 1309 Sofio, Esperanto-societo „48a Kongreso“. (Vd. la foton sur kovrilpaĝo II)

HUNGARAJ E-ISTOJ EN TÂRGOVIȘTE

La 10—11 de julio la e-istoj de Târgoviște gastigis grupon da e-istoj el la hungara urbo Eger. Lige kun tio Radio Ŝumen disaŭdigis raportojn de sia kunlaborantino DIMITRINKA KOSEVA, kiu tekstis jene:

„Hodiaŭ en Târgoviște alvenis grupo de 17 hungaraj e-istoj el la ĝemela urbo Eger laŭ invito de siaj kolegoj kaj speciale de tiuj ĉi infangardeno „Nadejda Krupskaja“, kun kiuj ili estas en amikaj rilatoj. La renkontiĝo okazis en la salono de la infangardeno. Krom la hungara grupo tie estis multe da instruistinoj kaj e-istoj de la urbo. Inter la domasstroj kaj gastoj okazis vigla interparolo, tuŝanta diversajn edukajn problemojn. La partoprenantojn salutis k-dino Ĝirgina Radeva — vicprezidentino de la Komunuma Popola Soveto. La mildaj infanetoj prezentis ĉarman programon. Plue la hungara grupo vizitis la distriktan historian muzeon, la bildgalerion, la naciajn junpioniran komplekson en v. Jastrebinio, la antikvan ĉelurbon Preslav kaj en la fino kune kun la delegitoj de la 40a kongreso de BEA forveturos al Plovdiv, ĉar ankaŭ ili estas aliĝintaj al ĝi.

K-do Zoltan Sabo, prezidanto de la E-societo en

Eger kaj gvidanto de la grupo, estis afabla apartigi kelkajn minutojn por interparolo kun mi. Li diris: „Ekde kiam mi alvenis vian landon kaj vian urbon, mi komprenis, ke mi venas en fratan landon. La bulgarioj estas frate afablaj. Mi bedaŭras, ke nia restado tie ĉi estas mallonga, sed mi kredas, ke ĝi estas ne nur interesa kaj afabla, sed ankaŭ utila. En la nomo de la e-istoj el Heveŝa-distrikto kaj Eger mi esprimas certecon, ke nia amikeco estos ĉiam frate forta kaj daŭra. Vivu la socialismo! Vivu Esperanto!“

Jen la vortoj de la infana instruistino Ĵujana Bernard: „Mi ege ĝojas, ke mi partoprenas en ĉi tiu vizito. Ĉio, kion ni vidis kaj aŭdis tie ĉi, estas interesa. Mi rakontos al miaj kolegoj pri la grava impresado de la bulgara infangardeno. Mia deziro estas: pluaj amikaj renkontiĝoj kaj kunlaboroj!“

**Jun
esperantisto**

LA INTERNACIA KOMUNIKADO KAJ LA JUNULARO

Intervjuo kun la prezidanto de MFDJ
ERNESTO OTTONE FERNANDEZ,



Lastatempe plivigliĝis la kontaktoj inter la Monda Federacio de Demokratia Junularo kaj la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Por plifortigi tiun kunlaboron ni petis intervjuon de kamarado Ernesto Ottone Fernandez, prezidanto de MFDJ.

La nun 30-jara ĉilia komunista instruisto sociajn sciencojn en unu el la universitatoj de sia lando. En MFDJ li komencis labori en 1973. Rezulte de lia elstara agado la asembleo de MFDJ elektis lin prezidanto en 1978.

K-do Ottone akceptis min en la budapeŝta sidejo de MFDJ. Nian konversacion ĉeestis ankaŭ Enrike Dratman, argentina vicprezidanto de MFDJ, kaj Andraŝ Simonij, estro de la ĉefsekretario de MFDJ.

Laŭ mia peto, k-do Ottone unue informis min pri la eksterordinare komplika kaj multflanka agado de MFDJ. Pli ol 280 junularaj organizoj kun pli ol

cent milionoj da membroj el 108 landoj apartenas al la Monda Federacio. Tiuj ĉi organizoj, kvankam reprezentantaj diversajn politikajn kaj sociajn movadojn, pere de MFDJ unuigas siajn fortojn servi al la intereso de la junularo kaj al la afero de la paco kaj progreso.

MFDJ ĉiam aŭdigas sian voĉon koncerne la plej gravajn mondeventojn. Kiam eblas, ĝi iniciatas la solvado de la problemoj kaj per proponoj kaj per agoj. Ekzemple, por la venko de la nikaragva revolucio gravan rolon ludis la solidareco de la demokratia junularo. Antaŭ nelonge MFDJ okazigis en Kolumbio internacian konferencon pri la batalo de la latin-amerika junularo por demokratiaj rajtoj. MFDJ ankaŭ en Cilio iniciatis malpli larĝan internacian konferencon pri la homaj rajtoj. (La konferencon oni sukcesis okazigi malgraŭ tio, ke la faŝisma registaro malpermesis ĝin kaj eligis el la lando la delegitaron de MFDJ.) Por apogi la liberecbatalon de la sudafrika popolo MFDJ organizis en Parizo, kunlaboro kun UNESKO, internacian solidarecan konferencon; en Hajderabado (Hindio) — renkontigon por solidariĝi kun Vjetnamio; en Sieraleono — konsultigon pri la nova internacia ekonomia ordo kaj ekonomia situacio de afrikaj landoj. Delegitaroj de MFDJ vizitis eĉ Sud-Libanon, kie ĝi diskutis kun Jaser ARAFAT la detalojn de la kampanjo de solidareco kun la palestina popolo. La konsultigon de eŭropaj junularaj organizoj, okazintan ĉe la lago Balatono (Hungario), partoprenis reprezentantoj de plej diversaj politikaj movadoj. Kaj ĉio ĉi tute ne estas kompleta listigo de nia pasintjara agado — diris la prezidanto de MFDJ.

— Dum tiom multflanka internacia agado verŝajne ofte prezentigas lingvaj malfaciloj. Kiel vi taksas la lingvajn problemojn de MFDJ?

— Ni renkontas certajn lingvaj malfacilojn. En MFDJ estas uzataj tri oficialaj lingvoj: la angla, la franca kaj la hispana. Tiamaniere ni ebligas por pli da homoj paroli sian gepatran lingvon aŭ uzi ĝin kiel perilon. Kompreneble, la scipovo de unu komuna lingvo ĉiam estas granda avantaĝo. Tion mi mem spertis en Latin-Ameriko, kie oni ofte okazigas altkvalitajn internaciajn konferencojn sen interpretado. En aliaj kontinentoj tio estas malfacila.

Tamen mi devas konstati, ke ne la lingva problemoj estas la plej grava por MFDJ: ni havas politikajn problemojn multe pli malfacilajn. Sed la lingva problemoj ekzistas; kaj loĝoj ĝi malhelpas la internacian komunikadon, la reciprokecan interkomprenigon.

— El la buĝeto de MFDJ kiom granda kvoto estas elspesata por tradukado, interpretado kaj pro aliaj kostoj ligitaj kun la multlingveco?

— Ni ne disponas precizajn kalkulojn, sed ni scias, ke granda parto de nia buĝeto estas uzata por forigi la lingvajn barojn.

— Vi ĵus diris, ke ekzistas problemoj pli gravaj ol la lingvaj. Tio estas evidenta. Tamen demandigas, ĉu la lingva problemoj ne influas la solvado de la aliaj gravaj taskoj?

— Nature, ke ĝi havas tian influon. La lingva problemoj estas unu el la plej grandaj malhelpoj al la interkomprenigo de la gejunuloj de diversaj landoj, kaj tiamaniere ĝi farigas unu el la gravaj problemoj de nia epoko. Sed MFDJ laŭ sia specifece okupiĝas unuavice pri aliaj taskoj: nome, la malarmado, la estigo de la nova internacia ekonomia ordo, la likvido de rasismo kaj ceteraj problemoj koncernantaj la junularon. Kompreneble, tio ne signifas, ke ni ne deziras okupiĝi pri la lingvaj demandoj.

— En la Statuto de MFDJ enestas, ke MFDJ zorge prisudas la problemojn de la junularo kaj strebas akiri amasan apogon por solvi tiujn ĉi problemojn.

Ĉu vi jam provis, aŭ nun planas detale pristudi la lingvajn problemojn de la junularo?

— Ni mem ne faris tiaspecajn pristudojn, tamen interesataj en tia agado, ni deziras kontribui al la solvo de tiu ĉi problemoj. Tiurilate nun pleje gravas, ke ni kunlaboras kun TEJO, kaj tion ni taksas ege pozitiva. La fakto, ke gejunuloj kun malsimilaj gepatraj lingvoj amase lernas la saman komunan lingvon kaj tiamaniere ili strebas pli bone interkompreniĝi kaj plilargigi sian horizonton — estas demokratia procezo, komplete konformiganta al la celoj de MFDJ. Pro tio ni apogas la agadon de TEJO kaj la ideon de E-o. Sed — miaopinio — la lingva problemoj estas tre kompleksa, al kies solvo kondukas pluraj vojoj.

Malgraŭ la fakto, ke nia programo ne enhavas pristudon de la lingva problemoj, ni strebas establi firmajn kontaktojn kun organizoj, pristudentaj ĉi problemojn kaj serĉantaj la vojon por solvi ĝin. Tial ni evoluigas niajn kontaktojn kun TEJO, kies agadon ni konsideras organa parto de la batalo por demokratio, por progreso kaj por mondo pli bona.

— En la Statuto kaj en la diversaj eldonaĵoj de MFDJ — unuavice en la revuo «World Youth» (Monda Junularo) — oni povas legi pri la konkretaj formoj de kunlaboro inter MFDJ kaj aliaj organizoj. Kia estas la formoj de kunlaboro inter MFDJ kaj TEJO?

— La celoj de MFDJ kaj tiuj de TEJO estas grandparte la samaj. Ambaŭ organizoj batalas por paco, por sekureco, por plifortigo de la internacia kunlaboro kaj por la rajtoj kaj pli bonaj vivkondiĉoj de la junularo. Konforme al tio, delegitaroj de MFDJ partoprenis la kongreson de TEJO en Nederlando, kaj delegitaroj de TEJO — la solidarecan konferencon en Parizo kaj la konsultigon ĉe Balatono. Ni regule informas unu la alian pri niaj agadoj, dezirante pluevoluigi niajn kontaktojn. Tiaspekte ankaŭ estontece ni restos ege malfermaj, atendantaj la proponojn de TEJO por plua kunlaboro.

— Ĉu vi konsideras, ke estas dezirata tiaspeca kunlaboro ankaŭ inter la membroj-organizoj de MFDJ kaj tiuj de TEJO?

— Nepre necesas, ke tiu kunlaboro ekzistu ne nur sur la nivelo de la internacia estraro, sed ankaŭ la unuopaj naciaj junularaj organizoj daŭre kunlaboru kun la lokaj organizoj de TEJO. Ĝenerale estas nia principo, ke la naciaj membro-organizoj de MFDJ — surbaze de siaj memstareco kaj sendependeco — serĉu la kontaktojn kun la naciaj membro-organizoj de ĉiuj internaciaj organizoj, kun kiuj ankaŭ la centra oficejo de MFDJ kunlaboras.

La lingva problemoj koncernas larĝajn tavolojn de la junularo. Ĉi problemoj kaŭzas multajn malfacilojn por la gejunuloj en la lernado, en la laborado kaj dum internaciaj renkontigoj — ĝenerale en la batalo por la komunaj celoj. Pro tio estas gravege, ĝuste por la junularo, ke ni sukcesu forigi la lingvajn barojn de la internacia komunikado.

— Fine, estus interese scii, ĉu en la sidejo de MFDJ troviĝas gejunuloj, kiuj serioze okupiĝas pri la lingva problemoj kaj speciale pri E-o?

— Tio eblas. El la karaktero de nia agado sekvas, ke ni havas junajn kunlaborantojn el ĉiuj mondpartoj, kaj ili ne laboras longe ĉi tie, ĉiam venas aliaj por ilia anstataŭo. Mi nepre informigos, ĉu laboras ĉe ni iu, kiu interesiĝas pri tiu vere grava problemoj. Se ni trovos gejunulojn, interesigantaj pri lingvistiko aŭ pri E-o, la e-istojn ni nepre informos pri tio. Ni esperas, ke ankaŭ tiamaniere ni sukcesos plifortigi niajn kontaktojn.

Andraŝ LUKAČ
El «Budapeŝta Informilo», n-ro 4/1980



LA UNUA ESPERANTISTO-KOSMONAŬTO EN LA MONDO

En la kadro de la programo Interkosmos ebligis ankaŭ la partopreno de du hungaraj kosmonaŭtoj en la esplorado de la kosma spaco — kapitanoj Bertalan Farkas kaj Bela Magjar. Ambaŭ estas ĉaspilotoj de unua klaso, ambaŭ de supersonaj aviadiloj kaj ambaŭ amikoj de la internacia lingvo Esperanto.

Kapitano BERTALAN FARKAS, kiu flugis la 26an de majo 1980 kune kun sia soveta kunfrato, la kosmonaŭto Valerij Kubašov, estigis do la unua esperantista kosmonaŭto en la mondo.

Lige kun tiu fakto Hungara E-Aso io eldonis specialan koloran faldfolion.

Bonege prezentis sin en Hungario

De 3 ĝis 23 de aŭgusto en u. Szekszard (Seksard), Hungario, estis organizita internacia junulara E-brigado. El 8 bulgaraj e-istoj, kiuj partoprenis la brigadon, 5 estis el la societo „Trifon Hristovski” — Botevgrad.

La dommastroj pritaksis merite la bonegan laboron de nia grupo. Ĉe la bilancraportoj ĉiuj gejunuloj el Botevgrad estis distingitaj. Fine de la brigado ĉiuj anoj de la grupo denove estis distingitaj kaj premiitaj.

Post la laborbrigado por ĉiuj brigadanoj estis organizita ripozo ĉe Balatono.

Vanko Bårdarov

SUKCESOJ DE ESPERANTO EN KRASNODAR (USSR)

Rezulte de bona propagando per ekspozicioj en la Domo de Instruistoj kaj biblioteko „A. S. Puŝkin” vekigis granda intereso al E-o.

En Kubana Stata Universitato dum la pasinta lernojaro E-o estis instruata en la fakultato de sociaj profesioj. Post dujara studado de la lingvo kaj sukcesa ekzameno la studentoj diplomigis kiel E-instruistoj. Gvidas la instruadon Kocarij Marina.

La Agrikultura Instituto akceptis E-on kiel fakultativan lernobjekton. Instruanto — Dudka Viktor.



PLENSUKCESA OrSEJT — 22

De la 28 de julio ĝis la 18 de aŭgusto en u. Krasnojarsk okazis 22an loĝon Orientsoveta Esperantista Junulara Tendaro (OrSEJT). Ĝin organizis la Krasnojarska E-klubo sub la aŭspicio kaj per subvencioj de Krasnojarska Urba kaj Regiona Komitatoj de Komsomolo kaj la urba Kulturpalaco.

La historio de SEJToj komenciĝas de 1959, kiam okazis la unua tiaspeca aranĝo nomita ĈET (Ĉebaltia E-Tendaro). Ĝin partoprenis nur 30 e-istoj. Post 8 jaroj jam unu tendaro ne sufiĉis kaj oni aranĝis du: unu komunan (BET) kaj unu specialan por gejunuloj (SEJT). En 1976 SEJT-on en Tihvin (Leningrada regiono) partoprenis 270 personoj, sed aliĝpetoj venis multe pli. Tial en 1977 SEJT-flagoj ekflirtis en du urboj: Poltavo (OkSEJT)¹ kaj Miaso (OrSEJT), kien alveturis ĉ. 320 junaj gee-istoj.

Tiom pri la historio. Kaj nun pri la 22a mem. La programo kiel ĉiam estis riĉa kaj varia. Ankaŭ la etoso estis ĉiam bona: regis bonhumoro, inventemo, entuziasmo... Ĉiuj programoj de OrSEJT-22 okazis nepre kaj nure en E-o. La tendaranoj vole-nevole obeis al la lingva disciplino ankaŭ pro la ĉion-vida aŭda-kaj-scia verda polico, kiu pere de siaj sekretaj agentoj gatis krokodilojn-krimulojn kaj en la ĉiutagaj matenkunvenoj prezentis ilin al la punavida publiko. La publiko entuziasme esprimis sian malestimon al la krokodiloj per komuna „u-u-u”.

Tre efika evidentiĝis la antaŭtendaro 4-taga paroliga periodo, dum kiu la komencantoj estis dividitaj je 9 apartajn teamojn, ĉiu el kiuj funkciis kiel turista grupo celanta paroligi la anojn. La grupoj kreis propran humuran etoson kaj elektis konforman nomon, ekzemple „Trogoditoj”, „Kanibaloj”, „Verdaj papagoj”, „Nek fiŝo”, „Nek viando”, „Atletoj — ge” k. a. Ankaŭ post la paroliga periodo ĉiuj grupoj estis konservitaj kiel bazaj unuoj de la tendara kolektivo. Ili konkuris en la malgranda SEJT-olimpiado, kontribuis al la vespero de surprizoj, gaja vespero, belarta konkurso „Oriento” kaj prezentado de amatoraj filmoj kaj lumbildoj pri soveta E-anraĝoj.

Sed la tendaranoj ne nur kaj ne ĉefe amuziĝis. Ili ankaŭ pridiskutis la plej diversajn flankojn de la internaciisma kaj porpaca agado de la E-kluboj, partoprenis en „subotniko”² kaj la perlaboritan monon transdonis al la Pacfonduso.

Okazis ankaŭ porpaca mitingo, en kiu la partoprenantoj akceptis alvokon al ĉiuj e-istoj de la mondo. Ĝin subskribis ĉ. 200 personoj el 54 loĝlokoj de USSR.

Enkadre de OrSEJT funkciis krome E-universitato, tradukistaj kursoj, seminarioj de E-instruistoj kaj aktivuloj, konkursoj de interpretistoj kaj oratoroj.

La 17an de aŭgusto OrSEJT-22 estis solene fermita kaj transdonis la stafeton al Ivanovo, kie ekde la 21 de aŭgusto komenciĝos ĝia parulo OkSEJT-22. Vladimir Sapoĝnikov

¹ OkSEJT — Okcidentsoveta Esperantista Junulara Tendaro.

² Libervola sabata senpaga laboro.

GRAVA!

EKSPOZICIO DE INFANDESEGAĴOJ. Libera temo. Dorse skribu adreson, nomon kaj aĝon. Ni rekomencos laŭdeziro. Ĉion sendu al: ESPE-RANTO-GRUPO, str. Forn, 19 — MOYA (Barcelona) — Hispanio.

La 65a Universala Kongreso de E-o okazis de la 2 ĝis la 9 de aŭgusto en Stokholmo — la ĉefurbo de Svedujo. Kiel kongresejo funkciis „Folkets Hus“ (Popola Domo) kaj apuda liceo. La kongreson partoprenis ĉ. 1800 homoj el pli ol 40 landoj.

Alta protektanto estis s-ro Ingemund Bengtsson — prezidanto de la sveda parlamento. En sia adreso al la kongresanoj li diris: „Lingva komprenigo inter homoj estas unu el la bazaj premisoj por konkordo en pli larĝa senco kaj je pli alta nivelo. Reteni kaj evoluigi la konon de lingvo, komuna por homoj de malsamaj naciecoj, estas valora pozitiva kontribuo al la laboro konservi paco kaj kunestadon en nia mondo.“

La solena inaŭguro okazis en la plej granda halo de la Popola Domo „Zamenhof“, en la ĉeesto de multaj diplomatiaj reprezentantoj. Saluti la kongreson esperantlingve la alta protektanto, kiu iam lernis E-on. Saluti ankaŭ multaj diplomatoj, inkluzive de la kulturataŭso de PR Bulgario k-do Z. Zahariev. La prezidanto de UEA prof. d-ro H. Tonkin faris plaĉan festparoladon.

Okazis du ĝeneralaj kunvenoj, en kiuj oni traktis la agadon de UEA, kaj kelkaj aliaj kunvenoj — pri informa agado, agado ĉe UN, parlamenta agado, sporta agado, regiona agado. Al la esperantologio estis dediĉitaj kvar kunvenoj, kie prelegis D. Blanke, J. Jermar, J. Pool, M. Givoje. Okazis ankaŭ fakaj kunvenoj de: instruistoj, matematikistoj, sciencistoj, medicinistoj, artistoj, muzikistoj, poŝtistoj, ferjojistoj, naturistoj, ornitologoj, aŭtomobilistoj, radioamatoroj, filatelistoj, turistoj, kristanoj, oomoto, skoltoj, veteranoj, vegetaranoj ka. Kelkaj kunvenoj estis dediĉitaj al la kongresa temo „Diskriminacio“. En apartaj seminarioj kaj diskutgrupoj oni pli intime tuŝis la diversajn aspektojn de tiu temo (diskriminacio kontraŭ etnoj kaj rasoj, ekonomio,

lingvo, virina, seksa, pro hejmlando, kontraŭ pliaĝuloj, infanoj ktp).

En la Internacia Somera Universitato (ISU) partoprenis elstaraj sciencistoj, literaturistoj, sociagantoj ka.: d-ro John Wells — „Lingva diskriminacio“, d-ro Jonathan Pool — „Lingva egaleco, lingva malegaleco kaj lingva diskriminacio: problemoj de konceptado kaj mezurado“, Probal Daŝgupto — „Lingva ignoro de virinoj: vorta kaj maniera“, Albert Goodheir — „Religia toleremo kaj maltoleremo“, d-ro Werner Bermann — „Diskriminacio pro hejmlando“, Baldur Ragnarsson — „La proza poemo kaj ĝia apliko en la Esperanta literaturo“, prof. Sin'itirō Kawamura — „Diskriminacio en nutrado, ne nur pro ekonomia kaŭzo“, Ye Junjian — „La karaktero de la moderna ĉina literaturo“, d-ro Wim M. A. De Smet — „Abundeco kaj malabundeco de fokoj“, prof. d-ro Humphrey Tonkin — „Jugo kaj antaŭjugo en Otel de Shakespeare“, d-ro Bela Meszáros — „Kelkaj demandoj pri la orientado, migrado kaj navigado de birdoj“, prof. d-ro Mago-met Izmailoviĉ Isaev — „Pri la soveta sperto en la likvido de la socia-kultura diskriminacio“, prof. Andrzej Rzymkowski — „Analizo de vilaĝaj arkitekturoj kiel pruvido pri egaleco de etnaj kulturoj“, prof. d-ro Carl Stop-Bowitz — „Koralrifoj tropikaj kaj arktoj“. Prelegis ankaŭ nia s-nino Bojka G. Baltaska je temo „La proteinoj de la maizo“.

La kongresanoj ĝuis la arton de konataj kaj nekonataj artistoj, kiuj partoprenis la internacian artan vesperon (inter ili ankaŭ niaj ges-anoj Maria Angelova kaj Veselin Damjanov), la svedan vesperon ka. V. Damjanov havis ankaŭ memstaran koncerton, kiel kutime kun bonega sukceso. Koncerton havis same la pola kantistino Bojena Zborovska. Memstaran recitalon „Rememoroj“ — la pola aktorino Jadviga Gibčinska.

En la internacia vespero aparte impresis la publikon Zuzana Kavulok, polino, kiu ludis per dukdo da antikvaj paŝtistaj muzikinstrumentoj el sia lando.

En la teatra vespero polaj geartistoj Kalina Pienkeviĉ kaj Zbignev Dobjinski prezentis la dramon „Proksima nekonato“ de Aleksandro Ŝebor.

Apartan vesperon okupis la pup-teatro de Rabka (Pollando), kiu prezentis „Muzikanto Zvitala“ de J. Vilkovski.

Okazis ankaŭ interkna vespero (fakte vespero de intervjuetoj), kongresa balo, oficiala akcepto en la urbodomo, junulara vespero, aŭkcio ka.

La komitato de UEA elektis novan estraron, kiu havas la jenan konsiston: prezidanto Gregoire Maertens (Belgio) kaj membroj Renato Kerseti (Italio), Baldur Ragnarsson (Islando), H. Tonkin (Usono), Ursula Grapalia (Brazilo), Eliza Kelet (Belgio), Flora Sabo-Felső (Hungario), ing. Petro Todorov (Bulgario).

Laŭ propono de la komitato la kongreso elektis 7 honorajn membrojn, inter kiuj ankaŭ la elstaran bulgaran E-aganton Nikola Aleksiev.

La kongreso koincidis kun la dato 6 de aŭgusto, kiam antaŭ 35 jaroj usonaj aviadiloj faris teruran barbarafon — jetis atombombojn super la japanajn urbojn Hiroŝimo kaj Nagasako. Lige kun tiu datreveno en la sveda ĉefurbo tutan tagon okazis kontraŭmilitaj manifestacioj, kiujn partoprenis ankaŭ e-istoj. Aparte notinda estas la terca manifestacio la vesperon de tiu tago, kiun partoprenis ankaŭ cento da kongresanoj, frunte kun la verda flago, portataj aŭŝoj. E-kantoj kaj skandado kontraŭ la nuklea milito kaj la militinstigantoj.

Bona kaj bone aranĝita kongreso — tia estis la 65a. Manifestaĵo de ĉiam kreskanta aŭtoritato kaj plena unueco ĉirkaŭ la sankta devizo de la e-istoj: paco en la mondo, amikeco inter la popoloj.

K. K.

JUNPIONIROJ AKTIVAS EN KIŜINEV

Dum la lastaj jaroj en Kiŝinev, Moldavio (USSR) ekagis junpioniraj E-grupoj en kelkaj lernejoj. Unu el la plej aktivaj estas la grupo „Kodreto“ en lernejo n-ro 45. Sub la gvido de Feliks Beršadski en la regiona pionira domo lernis la lingvon la unuaj junaj e-istoj.

La e-istoj de IX—X klasoj aranĝis la unuan E-vesperon kun arta programo sub titolo „La lingvo de la lando, kiu ne ekzistas sur la mapo“. La grupo partoprenis en la renkontigo de kiŝinevaj kaj odesaj e-istoj, dediĉita al la 120-datreveno de la naskigo de d-ro L. Zamenhof. En junio ni partoprenis en la emociiga noktmeza renkonto de la e-istoj el urbo Ruse ĉe la kiŝineva stadiono. La grupo ankaŭ preparis originalan ekspozicion per 20 standoj en E-o, moldava

kaj rusa lingvoj pri Moldavio kaj la moldava E-movado. La ekspozicio estos konstanta en la E-klubejo. En aŭgusto grupo el 8 pioniroj kaj 6 plenkreskuloj partoprenis en la E-tendaro apud urbo Ivanovo. Tie niaj pioniroj aranĝis apartan programon el la polaj kantoj kaj dancoj uzante sian karan trian lingvon E-o kune kun la moldava kaj rusa.

Kreskas kaj multigas la nombro de la novaj e-istoj en Kiŝinev kaj Moldavio — batalantoj por paco, interkomprenigo kaj homa feliĉo en la mondo.

Nia adreso por komunika kaj individua korespondado kun esperantistoj-pioniroj el Bulgario kaj tutmonde: Moldava SSR, 277045 Kiŝinev, ul. Florilor 14, skola № 45, Esperanto-klubo „Kodreto“.

Tamara Maslenko

INSTRUISTO DE INSTRUISTOJ

Pasis jam unu jaro ekde la morto de Sergej Grigorjeviĉ Rubljov — fama aŭtoro de la lernolibro „Esperanto-rondeto“. Tiu lernolibro aperis en du partoj: la unua — por lernantoj, la dua — por instruistoj. La rusa eldono atingis 110 000 ekzemplerojn. La lernolibro aperis sisteme en kvin lingvoj. Laŭ tiu libro ellernis E-on multaj rusoj, ukrainanoj, bulgaroj, germanoj, francoj.

S. G. Rubljov naskiĝis en Odeso (Sovetunio) en 1901. Laŭ profesio li estis inĝeniero-kemiisto. En la jaroj 1929—1941 kaj de 1945 ĝis la pasinta jaro Rubljov laboris en Odeso en farba-laka fabriko. Dum 24 jaroj li estis ĉefo de la centra laboratorio, plenumis multajn esploralaborojn, parto de ili estis publikita. Pro sia laboro en 1964 j. Rubljov ricevis distingitan titolon Merita Inventisto de Ukraina SSR.

Esperantiĝis Rubljov en la jaro 1919. De 1921—1929 li estis unu el la gvidantoj de la E-movado en Odeso. Rubljov estis elektita en la Centra Komitato de Soveta Esperantista Unuiĝo (SEU). De 1929 li estis membro de Internacia Lingva Komitato kaj reprezentis en ĝi Sovetunio.

Samtempe Rubljov multe laboris kiel scienca lingvisto. Li estas aŭtoro de kelkaj sciencaj verkoj pri esperantologio kaj specialaj E-vortaroj. Estis publikitaj: „La esperantaj radikoj“, „La provo pri kvanta analizo de Esperanto“, „Plej mallonga vortaro de Esperanto“, „Sistema vortaro de Esperanto“, „Vortaro de ritmoj“, „Leksiko de proksimaj formoj“, „Pri la problemoj de grafiko en Esperanto-instruado“, „Paĝetoj de sistemvortaroj“ k. a.

Rubljov ankaŭ tradukis la librojn „La kemio en Universo“ kaj „La vojo al scienco de la estonto“ — verkoj de A. Fersman.

Rubljov estas konata kiel talenta tradukisto de la plej famaj rusaj sovetaĵoj: Puŝkin, Tjutĉev, Lermontov, Bunin, Nekrasov, Balmont, Blok, A. Tolstoj, Majakovskij, Esenin, L. Ukrainka, ankaŭ de nuntempaj poetoj kiel P. Tiĉina, M. Rilskiĉ, Sĉipaĉov, Jevtuŝenko k. a. Li tradukis ĉirkaŭ 600 poemojn kaj versaĵojn el 53 aŭtoroj. Liaj tradukoj baziĝas sur la teorio de sonritma versa strukturo.

Aparte ni devas atentigi pri la fundamenta kaj majstra traduko de la fabloj de la fama rusa fablisto Krilov. Devas aperi ankaŭ 111 fabloj de Krilov en traduko de Rubljov en hungara E-eldono. Restis en manuskripto multaj tradukoj de Rubljov el diversaj poetoj.

Sergej Grigorjeviĉ Rubljov estis modesta kaj laboremulo.

Memore al la unua jaro de lia forpaso la esperantistaro, aparte ni, la odesaj e-istoj, unuanime deklaras, ke lia nomo ĉiam inspiras nin al sindona laboro por E-o, por la paco, por la interpopola amikeco.

Naum Sigal — Podolski



KRILOV EN ESPERANTO

En la E-libroeldonejo „Stafeto“ en la serio „Oriento-Okcidento“ (sub la aŭspicio de UEA), aperis la libro „Krilov — elektitaj fabloj“ en traduko de Sergej Grigorjeviĉ Rubljov.

La enkondukon faris la prezidanto de UEA prof. d-ro H. Tonkin. Li rimarkigas, ke la valoroj, kiujn prezentas Krilov, havas sian originon parte en la rusa tero, parte en la klasika tradicio, kiu komenciĝis jam ĉe Ezopo. La kombino de universaleco kaj naciaj trajtoj ĉe Krilov faras liajn fablojn ideala aldono al la serio „Oriento-Okcidento“. Tio kontribuas al la klopodoj de UNESKO proksimigi la popolojn en la mondo. La tradukinto donis koncize ĝeneralan skizon pri la verkaro de la elstara fablisto Ivan Krilov (1769—1844), kiu verkis kiel granda satiristo. Krilov akre kritikis la negativajn flankojn de la homaj moroj kaj kutimoj kaj de la sociaj rilatoj de sia tempo. Multaj esprimoj de la fama fablisto delonge fariĝis veraj popularaj proverboj.

En kvar paĝoj la tradukinto donas ankaŭ kelkajn rimarkojn pri la E-traduko de la fabloj. Li notas, ke li havis la celon speguli la poeziajn kvalitojn de la originalo.

La libro, lukse eldonita, entenas 182 fablojn sur 329 paĝoj kaj multajn ilustraĵojn. La verko estas aranĝita en alfabela ordo, kio donas eblecon pli rapide trovi serĉatan fablon.

Do, la multjara skrupula laboro de S. Rubljov estis kronita per bona sukceso. Dank' al lia laŭdinda penado ni jam havas la senmortajn verkojn de Krilov en bona E-o.

N. Sigal

Kooperativa broŝuro en Esperanto

Aperis esperantlingve nova broŝuro de la Centra Kooperativa Unuiĝo en Bulgario sub titolo „Sub kooperativa stelo“. Ĝi venis dank' al la konstanta kunlaboro inter CKU kaj BEA.

Kvankam kelkpaĝa la broŝureto donas interesajn informojn pri la bulgara kooperativa movado. De la unua artikolo la leganto komprenas, ke ĉiare la bulgara kooperativo celebros sian 90an naskiĝtagon. Ĝi membras en la Internacia Kooperativa Unuiĝo ekde 1903, observante strikte la kooperativajn principojn. Nun CKU kunlaboras kun pli ol 60 partneroj.

Nur el kelkaj paĝoj oni povas ekkoni la varian agadon de CKU, kiu posedas tri milionojn da membroj, kaj vidi kiom multflanka estas la laboro de la filioj de CKU.

La lasta artikolo nur markas skize la sport-turisman aktivecon de la ĉefurbaj kooperativanoj. Dum la kuranta jaro la sporta kooperativa klubo „Start“ en Sofio organizos pli ol 50 diversajn sport-turismajn festojn, konkurojn k. a.

La broŝureto estas bona legaĵo por ĉiu esperantisto.

La dezirantoj povas ricevi tiun ĉi broŝureton de la Kooperativa Sekcio de BEA, bul. „Hr. Botev“ 97, 1303 Sofio, Bulgario, kontraŭ neuzitaj poŝtmarkoj por la sendokostoj.

D. Matuŝev

Sur la foto: Junaj e-istoj en Odesa antaŭ la busto de d-ro L. L. Zamenhof.

PRI LA KUNMETITAJ VORTOJ

Kiam ni observas la kunmetitajn vortojn, ĉu tiujn, kiuj jam stabiligis kaj troviĝas en la vortaroj, ĉu tiujn, kiuj estas produkto de momenta invencio, ni konstata, ke el struktura vidpunkto ili formas du kategoriojn. En la unua kategorio estas vortoj kiel loĝloko, bonveno, altrange, amuzvespero, animstato ktp. En la dua kategorio estas vortoj kiel dormoĉambro, legolibro, artohakisto, anglalingvano ktp.

La morfologia karaktero de la unua parto de la vortoj en la unua kategorio estas tute klara. Ĝi estas radikoj: loĝ-, bon-, amuz-, anim-. Sed kion prezentas la unua parto de la kunmetitaj vortoj en la dua kategorio? Ĉu ĝi estas vorto? Se tiu ĉi parto estas vorto, tiam ne povas ne aperi la demando, pro kio por formado de la kunmetitaj vortoj de la unua kategorio sufiĉas, kiel unua parto, nur radikoj, dum por formado de la kunmetitaj vortoj de la dua kategorio ne sufiĉas radikoj, sed necesas vorto.

Se ni serĉos klarigon en la sfero de la morfologio aŭ en la sfero de la semantiko, ni ne trovos respondon. Nenia morfologia aŭ semantika bezono postulas uzon de vorto. Tion ni povas facile pruvi. Anstataŭ dormoĉambro, legolibro, artohakisto, anglalingvano ni povas diri dormĉambro, leglibro, arbhakisto, anglilingvano kaj ni konstato, ke ekestos nenia morfologia aŭ semantika ŝanĝo de la kunmetita vorto. Tio ne povas ne konduki nin al la konkludo, ke ankaŭ ĉe la dua kategorio de kunmetitaj vortoj la radikoj, kiel unua parto de la vorto, sufiĉas. Do la vokalo post la radikoj en la unua parto de la vortoj de la dua kategorio estas superflua el morfologia kaj semantika vidpunkto. Ĝi ne portas signifon, nek semantikan, nek gramatikan. Ĝi ne estas fonemo.

Sed pro kio ni uzas ĝin? Evidente pro konsidero de belsoneco. Ĝi estas belsoneca ornamo de la kunmetita vorto. Se ni diras ne dormĉambro, sed dormoĉambro, ne leglibro, sed

legolibro, ne arbhakisto, sed arbohakisto ktp, tio estas nur pro konsideroj de belsoneco.

Tamen nun venas nova problemo. Kiu vokalo estos la plej bona belsoneca ornamo de la kunmetita vorto? E-o havas kvin vokalojn: a, o, u, e, i. Kiu el ili estas plej belsona? Ĉu en E-o ekzistas regulo, kiu preskribas la uzadon de vokaloj ĉe strukturigo de la vortoj, do regulo pri vokala harmonio?

Isas etnaj lingvoj, en kiuj tia regulo ekzistas, ekzemple la turka kaj la hungara. En E-o tamen ĝi ne ekzistas. Tiam? Ĉu ĉiu uzanto de E-o estas libera uzi kiel kunigan vokalon tiun, kiu plej plaĉas al li? La respondo devas esti jesa, laŭ la principo, ke tie, kie ne ekzistas leĝo, kiu preskribas ian konduton, ĉiu povas konduti laŭ sia plaĉo. Do oni povas diri agrokulturo aŭ agrikulturo, juroscienco aŭ juriscienco, kaprokornulo aŭ kaprikornulo ktp. Sekvante la logikecon de tiuj ĉi konsideroj oni ne povas diri, ke estas nelaŭlegaj tiaj kunmetitaj vortoj kiel dormuĉambro, dormiĉambro, dormeĉambro aŭ dormaĉambro, legolibro, leglibro, legelibro aŭ legalibro. Sciate estas tamen, ke en la praktiko ne renkontiĝas tiaj kunmetitaj vortoj. Pro kio? Ĉu ankaŭ en E-o formiĝis ia regulo pri vokala harmonio, kiu preskribas, ke la intera vokalo de la vorto dormoĉambro devas esti la vokalo o, sed ne alia, kaj tiu de la vorto gustatempe devas esti a, sed ne alia?

Eble estus plej trafe diri, ke la parolanto uzas kiel kunigan vokalon tiun, kiu memorigas al ili la finaĵon de la vorto, el kiu, laŭ ili, estas formita la unua parto de la kunmetitaj vortoj. Kaj kiel formanta vorto aperas en la konscio de la parolanto, antaŭ ĉio, la vorto, kiu estas plej ofte renkontata. La uzanto senkonscie emas vidi la unuan parton de la kunmetitaj vortoj en tiu kostumo, en kiu ĝi estas plej bone konata.

Kiu vokalo al kiu kunmetita vorto konvenas — tion decidos nur la praktiko.

LJUBOMIR MIHAJLOV

Subite kaj tragike pereis la juna e-istino

Vesela Jordanova Atanasova

23-jara studentino en la Universitato de Blagoevgrad, nura filino de nia fervora samideano kaj E-veterano Jordan Atanasov el v. Polsko Kosovo, distrikto Ruse.

Post mallonga malsanado en Sofio forpasis

d-ro Dimo Nikolov Dimov

Esperantisto ekde sia juneco, li ĉiam arde propagandis E-on en nia lando ka eksterlando dum siaj multnombraj veturadoj kiel ŝipkuracisto.

En Sofio forpasis 67-jara la E-veterano

Dimitro Dimitrov Stojkov

naskita en v. Bujnovci, distrikto de Veliko Tŕrnovo, aktiva batalanto kontraŭ la faŝismo. Antaŭ la 9 de Septembro 1944 li kunlaboris al diversaj progresmaj eldonaĵoj, post la popola venko — multjara kunlaboranto de Radio-Sofia kaj ĉefredaktoro de revuo „Televideo-Radio“.

E-isto de 1931 j., li arde propagandis E-on, korespondis kun e-istoj el multaj landoj.

Niajn kondolencojn al la funebrantaj familianoj!

„En nia vortaro troviĝas ĉ. 10 000 nenecesaj vortoj, sed kion farus sen ili niaj politikistoj.“ (El la enkonduko de unu el la eldonoj de la franca „Larus“ — „Larousse“).

„La kalvo sur nia verto ne estas la plej danĝera. Multe pli danĝera estas la kalvo sur ĝia interna flanko.“ (Jul Brinon).

Sciigo antaŭ naskodomo en Parizo: „La tempo de vizitado fare de edzoj aŭ de ties komisiitaj anstataŭantoj estas de 14 ĝis 16 horoj.“

Eliot: „En la mondo abundas maljustaĵoj. Bankiero povas skribi malbonan poemon — kaj nenio. Nu, la poeto provu skribi malbonan ĉekon!“

Kiam oni demandis usonan negociston, kiel li ŝatas la fiŝojn en la akvario, li respondis: „Mi ŝatas rigardi estaĵojn, kiuj malfermas la buŝojn ne por postuli plialtigon de la ŝalajro.“

La plej peza viro en la mondo estis la usonano Robert Hol Hughes. Dekjara li pezis 171 kg, 13-jara — 248 kg. La plej alta pezo estis 485 kg. Hughes mortis 32-jara de uremio, kaj lia ĉerko estis metita en la tombon per levmaŝino.

Oni parolas, ke vivis ankoraŭ pli peza usonano — Gon Opi el Norda Karolino. Li pezis 513,5 kg, sed tio ne estas oficiale dokumentita.

La plej malnova ĉefurbo en la mondo estas Damasko (en Sirio), loĝata senĉese ekde 2500 jaroj a. n. e. La plej malnova fortikigita urbo en la mondo estas Jeriĥo en nuna Jordanio. La sciencistoj supozas, ke ĝi estis loĝata jam 7800 jarojn a. n. e.

GRAVA!

LETERVESPERO. Realigota en decembro 1980. Sendu esperantajn, leterojn, pk, librojn, prospektojn, broŝurojn, revuojn ktp. Estas 10 libropremioj por la plej bonaj sendaĵoj.

Adreso: Esperanto-Lernejo — Casilla de Correo 278—2000 ROSARIO, Argentino.



La vortoj estas sesliteraj. Oni devas skribi ilin samdirekte de la horloĝmontrilo.

1. Kia fariĝis la bulgara popolo je la 9. IX. 1944?
2. Glaseto. 3. Ofte uzata verbo. 4. Progreso. 5. Birdo.
6. Entuziasma esprimo. 7. Apartenanta ekskluzive al iu. 8. Moko. 9. Borsaj spekulado. 10. Surterigo.
11. Franca pentristo-impresionisto. 12. Mita gardanto de minaj trezoroj. 13. Tropika frukto. 14. Homoj pe-reintaj en batalo por popola libereco. 15. Senti entuziasman raven, rigardante iun aparte simpatian.
16. Kamarado. 17. Sciigo. 18. Speco de ŝtofo. 19. Speco de arbo. 20. Kemia elemento.

Marija Blagoeva

ĈU VI ESTAS OBSERVEMA?

En n-ro 3/1980 ni publikigis du similajn unu al la alia desegnaĵojn, kiuj tamen havas kelkajn diferencojn. Ni proponis al niaj legantoj malkovri kaj priskribi ilin en E-o. Solvon de la tasko sendis deko da leganto el Bulgario kaj Sovetunio. Plej multe da diferencoj malkovris kaj plej trafe priskribis ilin nia aktivulo Pejo Peev, strato „Dunav“ 38, vĥod II, BG-4400 Pazarĝik. Li ricevis kiel premion E-libron.

La redakcio akceptas la rekomendon de k-do Peev: aperigante tiajn desegnaĵojn nepre menci la ĝustan nombron de la diferencoj en ambaŭ desegnaĵoj, por ke oni havu klaran difinitan celon kaj kontroleblecon.

SOLVO

1. En la dekstra angulo de la dua desegnaĵo kontraŭ la nuboj mankas la linio, formanta malproksiman montokreston.
2. En la dua desegnaĵo sur la ĉapelo de la edzo estas horizontala linio.
3. Sur la dua bildo la viro estas en ŝuoj.
4. La ŝuoj de la virino sur la dua bildo estas nigraj.
5. Sur la dua bildo la du randoj de la fermokovrilo de la virina mantelo estas horizontalaj.
6. La iriso de la maldekstra okulo de la virino sur la dua bildo estas desegnita per linieto kaj sur la unua — per punkto.
7. Sur la pilko en la dua bildo ne estas linio, formanta trianguleton.
8. Sur la beko de la cikonio (dua bildo) estas blanka punkto.
9. En la dekstra mano de la batanta knabo estas

- bastoneto (dua bildo).
10. La kolumo de la knabino, sidanta sur la genuo de sia patro, estas nigra (dua bildo).
11. Inter la unua kaj la dua branĉoj de la arbo maldekstre ne estas videbla la konturo de la monto-kresto (dua bildo).
12. Sur la dua bildo ne estas videbla la okulo de la batanta knabo.
13. La dekstra okulo de la bebo, kiun portas la cikonio, estas desegnita per linieto (unua bildo).
14. Sur la dua dika maldekstra branĉo ne estas videblaj du linietoj (dua bildo).
15. Super la maldekstra brovo de la viro estas linieto al la ĉapelo (dua bildo).
16. RIMARKO: Estas ankoraŭ kelkaj diferencoj inter la arboj, la herbejoj ka., sed ŝajne tio estas pro la presado.

Pejo Peev